



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

12  
1972




Laboristinoj rigardas artan prezentadon en ĝardena amuza kunveno.

Pekinaj infanoj partoprenas amuzan kunvenon en Taŭjanting-parko.



# Varma Celebro de la 23-a Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj lernantoj de diversaj nacioj de la Centra Nacia Instituto laŭte prikantas la grandan socialisman patrolandon.



Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino, Ĉefministro Penn Nouth kaj lia edzino, Speciala Komisiito Ieng Sari kaj aliaj kamboĝaj honorindaj gastoj partoprenas en festa amuza aktivado aranĝita de la pekina popolo en Ĝongŝan-parko akompanate de Dong Bivu, Ĝou Enlaj, Giang King, Je Gianjing, Li Hiannian kaj lia edzino Lin Giamej, Li Deŝeng, Hju Hiangkian, Vu De, Han Nianlong kaj aliaj.



Ĝu De, Guo Mojuo, Hua Guofeng, Li Fuĉun kaj aliaj kamaradoj partoprenas en festa amuza aktivado en la Somera Palaco kune kun ĉefurbaj popolamasoj.





Jaŭ Venjuan, Gi Dengkuj, Vang Donghing, Vang Hongven, Geng Biaŭ kaj aliaj kamaradoj partoprenas en festa amuza aktivado en la Kultura Palaco de Laboruloj kune kun pekinaj popolamasoj.





Albanaj geamikoj celebras la 23-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kune kun pekinaj amasoj.

Koreaj amikinoj celebras la 23-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kune kun pekinaj amasoj.




Vjetnamaj kunbatalantoj partoprenas en festa amuza aktivado en Pekino.




Rumanaj geamikoj partoprenas en festa amuza aktivado en la Somera Palaco.





Italaj geamikoj partoprenas en festa amuza aktivado en Ĝongŝan-parko.

Ĉinoj el Hongkong kaj Aŭmen venintaj al Pekino por partopreni en celebrado de la Nacia Festo sin fotigas antaŭ la Somera Palaco por memoro.





# Popolanoj de Pekino Ĝoje Celebris la Nacian Feston

**L**A 1-an de oktobro, la tutan Pekinon regis festa atmosfero.

La giganta portreto de Prezidanto Maŭ pendis sur la centro de la ruĝa muro de Tian-anmen-pordego; la majesta nacia emblemo sur la pordego okulfrape brilis; kaj la freŝe ruĝa kvinstela flago flirtis en vento. La Ĉina Popola Respubliko persone fondita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ venke trapasis sian batalan vojon de 23 jaroj.

Matenon, centmiloj da ĉefurbanoj en festaj vestoj kaj kun plena ĝojo venis en vicoj al la Kultura Palaco de Laboruloj, Ĝongŝan-parko, la Somera Palaco, la parkoj Ĉiela Altaro, Taŭjanting kaj Ziĝujan, sportejoj, teatroj kaj kinejoj por celebri la brilan feston de la granda patrolando.

Dekmiloj da laboristoj de la ĉefurbo ĝoje kolektiĝis en la Kultura Palaco de Laboruloj. Ĉu sub grandaj cipresoj aŭ en subĉiela scenejo kaj amuzejoj, ĉie estis ĝojaj laboristoj, ĉie sonis kantoj.

Afinaciisto Jang Hinĝen, membro de la partia komitato de la afinacia fabriko de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio, ĉiam persistas en produktado. Frumatene de la 1-a de oktobro, li venis al la Kultura Palaco de Laboruloj por partopreni la celebran aktivadon, tuj post kiam li kaj liaj grupanoj afinaciis 12 fornojn da bonkvalita ŝtalo kiel donacon al la Nacia Festo. Vizaĝe al la grandioza celebra sceno li emocie diris: "La venko akirita de ni estas nur nova starto. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ni afinaciistoj decidis gajni ankoraŭ pli grandan venkon."

Tiutage, la antikva Somera Palaco aspektis aparte bela. La longa koridoro, ŝtona ŝipo, kioskoj, pagodoj, verdaj arboj kaj freŝaj floroj ĉarme ornamis la lagon kaj monton en la parko.

Enirinte ĝin, oni tuj vidis grupon da naivaj kaj viglaj infanoj, kiuj bonvenigas vizitantojn per danco *Celebro pri Riĉa Rikolto* kun modeloj de maizoj kaj kotonfruktoj en siaj manoj. La komunumanoj de la antaŭurbo, kiuj venkis la printempan kaj someran trosekecon sub gvido de la partiaj organizoj kaj gajnis riĉan rikolton, estis allogitaj de la spektaklo.

La batalaj kantoj spegulantaj armean vivon kondukis la komandantojn kaj batalantojn de la dua tanka roto de iu trupo de ĈPLA kvazaŭ al streĉa trejnado. Tiu ĉi heroa roto, kiu multe faris meritojn, direktis sian militan trejnadon per la penso de Prezidanto Maŭ pri armeonstruo kaj altigis sian batalkapablon. La rotestro Lju Hiaŭĝu esprimis, ke ili daŭre disvolvos la gloran tradicion de la armeo kaj altigos singardemon por defendi la patrolandon.

En Ĝongŝan-parko ombrata de verdaj arboj kaj lerte ornamita de floraj bedoj, multaj nacimalplimultaj gejunuloj dancis laŭ la takto de melodia muziko. La gaja danco montris, ke diversnaciaj gejunuloj en vagonaro veturas de malproksima landlimo al la ĉefurbo por lernado. La junuloj kun emociita koro kantas kaj dancas sur la vojo al la tagnokte sopirata Pekino. Inter tiuj dancantoj 18-jara mongola junulino Erdengcajci ludis tre bone. En tiu ĝojiga momento, ŝi pretervole ekpensis pri

sia patrino, kiu forkuris al profunda monto pro persekutado de paŝtista mastro kaj vivis mizeran vivon kiel la Blankhara Knabino jam de la aĝo, kian ŝi nun havas. Kiel ŝi povis ne senti feliĉon en la nova socio, kiam ŝi memoris la pasintecon de sia patrino en komparo kun sia nuna vivo! Apud ŝi estis tibeta junulo Pubucijfen. Kun feliĉaj larmeroj en la okuloj li dancis eksterordinare gaje. Kiel li, ido de sklava familio povis ne senti la varmecon de la granda familio de nacioj!

Samlandanoj el Hongkong, Aŭmen kaj Tajvan, transmaraj ĉinoj kaj eksterlandanoj de ĉina deveno ĝoje partoprenis la festan amuzan aktivadon. Ili estis tre kortuŝitaj de la brilaj sukcesoj akiritaj de la socialisma patrolando kaj intima zorgo de la patrolanda popolo. En la Somera Palaco, la tajvan-aj ĉinoj el Japanio intime interbabilis kun la komunumanoj de la antaŭurbo. Liaŭ Ziguang, ĉino loĝanta en Usono, ĝoje diris: "Post kiam la pordo de intervizitado inter la popolanoj de Ĉinio kaj Usono estis malfermita, multaj usonaj amikoj des pli interesiĝas pri Ĉinio kaj partoprenas la grupojn amikajn al Ĉinio unu post alia. Viziti Ĉinion jam fariĝis ilia varma deziro."

La starigo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio tuj antaŭ la festotago ekstreme ĝojigis la ĉinojn el Japanio. Ĉen Kunvang, vicestro de

la Tokia Ĝenerala Asocio de Transmaraj Ĉinoj, sendis salutan telegramon al sia asocio en la nomo de la ĉinoj loĝantaj en Japanio venintaj al Pekino. Tiutage li partoprenis la parkan celebradon kaj kun emocio esprimis ke post sia reveno li faros kontribuojn por firmigi kaj disvolvi la amikan rilaton inter la ĉina kaj japana popoloj.

**Niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo.** Kunportante sinceran amikecon de diverslandaj popoloj, la geamikoj el la kvin kontinentoj ĝoje celebris la festotagon kune kun la ĉefurbaj amasoj. Kien iris la albanaj kunbatalantoj venintaj de la fronto kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, tie aŭdiĝis varmega manklakado. La rektoro de la Ŝtata Tirana Universitato de Albanio Agim Mero diris: "Estas ĝoje ke ni havas ŝancon ĝui venkon kune kun la ĉinaj kamaradoj. Ni deziras, ke la ĉina popolo gajnos novan venkon sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong."

Sur la surakva scenejo de la Somera Palaco prezentigis akrobatoj. Tien venis la kunbatalantoj de la Kultura Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio. Post rigardo de la programeroj, komponisto Kim Dik Hak varme gratulis ke la floro de arto floru ankoraŭ pli bele kaj bunte sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

*Japanaj amikoj en ĝardena amuza kunveno okaze de la Nacia Festo*






En Ĝongŝan-parko, la kantoj kaj dancoj prezentataj de artaj laborantoj allogis multajn fremdlandajn amikojn. Per batalaj kantoj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo ili prikantis la grandan venkon de la trilandaj popoloj de Hinduĉinio en sia nacisava batalado kontraŭ la usona agreso, kaj esprimis firman subtenon de la ĉina popolo al la hinduĉiniaj popoloj en ilia batalado. La vjetnamaj kunbatalantoj varme manklakis aŭskultinte la kanton *Vjetnamio — Ĉinio* pri la batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio. La Laosa Delegacio de Sindikatoj venis al la Kultura Palaco de Laboruloj kaj partoprenis en festa amuza aktivado kune kun la ĉefurbaj laboristoj. Ĝia estro Khamma Phomkong, la ĝenerala sekretario de la Laosa Federacio de Sindikatoj, esprimis ke la laosa popolo nepre plifirmigos sian unuiĝon kun la vjetnama kaj kamboĝa popoloj por konduki ĝisfine la nacisavan militon kontraŭ la usona agreso!


Post publikiĝo de la Komuna Deklaro de la Registaroj de Ĉinio kaj Japanio, la japanaj amikoj en Pekino estis tre ĝojaj. Frumatene ili jam venis al parko. Kitamura Hiroaki de la Japana Akcela Asocio de Internacia Komerco diris: “Mi estas tre ĝoja, ke samtempe alvenis la ĉina nacia festo kaj ankaŭ la oficiala starigo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio.

Nokte, ilumiĝis Tian-anmen-placo. La granda slogano “**Unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandan venkon**” formita per lampoj disdonis okulfrapajn radi-ojn. La ĉefurbaj popolanoj varme celebris la brilajn venkojn akiritajn de nia granda patrolando dum la pasintaj 23 jaroj. Ili decidis, sub la bonega situacio en- kaj ekster-landa kaj laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, klopodi por bone fari diversajn laborojn kaj plirapidigi la paŝojn de la socialisma konstruado por gajni ankoraŭ pli grandan venkon.



*Transmaraj ĉinoj kaj pekinaj popolanoj kune rigardas prezentadon en la Somera Palaco.*





*Grandioza amuza kunveno en ĝardeno de Pekino okaze de la Nacia Festo*



*Akrobataĵo en ĝardeno amuza kunveno*

# Nia Merkato en Prospero

**S**UB la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo renversis la reakcian regadon de Kuomintango, ŝanĝis la posedsistemon de la bienularo kaj burĝaro, fondis la novan socialisman produktan rilaton kaj socialisman ekonomion, plue antaŭenpuŝis la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon kaj diligente klopodas por ŝanĝi la malriĉan kaj postĝintan fizionomion postlasitan de la malnova Ĉinio, tiel ke nia lando jam fariĝis unuapaŝe prospera kaj potenca socialisma lando. Kun senĉesa disvolviĝo de la nacia ekonomio, prosperas la merkato, stabilas la varprezoj kaj pli kaj pli boniĝas la vivo de nia popolo.

## PROSPERA MERKATO

Sub la direktado de la ĝenerala linio de la Partio “**streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**”, nia popolo akiris riĉajn rikoltojn de agrikulturo en sinsekvaj jaroj kaj senĉese disvolvis industrian produktadon, kio kreis abundan materialan fonton por la merkato. La vastaj amasoj de komercaj laborantoj serioze plenumas la ĝeneralan politikon de la ekonomia kaj financa laboro “**disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon**”, laŭplane organizis cirkuladon de komercaĵoj, tiel ke pli kaj pli prosperas la merkato en urboj kaj kamparo. La kvanto de aĉetitaj, venditaj kaj



*Legom-kulturantoj en antaŭurbo de Pekino ĉiutage transportas al la urbo grandan kvanton da freŝaj legomoj.*



*Jacquard-aj litkovriloj el lano de Higitan, Ninghia, produktitaj de la Lana Ŝpinteksa Fabriko de Jinĉuan estas tre ŝatataj de klientoj*

stokitaj varoj plenamplekse pligrandiĝis. La totala kvanto de la detalitaj komercaĵoj en 1971 5-oble plimultiĝis ol tiu en 1949. La bezono de manĝaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj de la popolo estas fundamente kontentigita.

Sub la regado de la kuomintanga reakciularo, la produktokvanto de greno en la malnova Ĉinio estis nur 105 miliardoj da kilogramoj, el kiuj 35 miliardoj estis forprenitaj de la bienula klaso kiel terrento. Kaj krome, ankaŭ pro pezaj impostoj, ĉantaĝo de ŝtataj oficistoj kaj akaparado de fikomercistoj, la laboranta popolo vivis tre mizere. Post la Liberiĝo, dank' al nuligo de la kruela ekspluatato fare de la bienula klaso kaj efektiviĝo de laŭplanaj aĉeto kaj provizado de greno, la grenaprovizado al la popolo estis garantiata. Pro popol-komunumigo en nia kamparo kaj vasta disvolvo de la amasa movado "**Ierni de Daĝaj en agrikulturo**", la produktokvanto de greno plimultiĝis jaron post jaro. En 1971 la jara produktokvanto de greno atingis 246 miliardojn da kilogramoj, t.e. pli-ol-2-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Samtempe kun la senĉesa kresko de la grena produkto, forstokulturo, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝbredado disvolviĝis ankoraŭ pli bone. La kvantoj de viandoj, ovaĵoj, fiŝoj, kortobirdoj, legomoj kaj fruktoj en la merkato

kelkoble aŭ dekelkoble plimultiĝis ol tiuj antaŭ la Liberiĝo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la produktado de kotono kaj ŝpinteksa industrio disvolviĝas paŝon post paŝo. La produktokvantoj de kotono kaj ŝtofoj en 1971 pliiĝis respektive kvaroble kaj pli-ol-3-oble ol tiuj en 1949. La proviza kvanto de kolora kotonŝtofo, kakio, gabardino, ĉemizoj, veŝtoj, trikitaj subvestoj, lavtukoj kaj ŝtrumpoj multe pliiĝis kaj fundamente kontentigis la bezonon de la popolo. Ankaŭ la proviza kvanto de drapo, veluro, silkaĵo kaj teksaĵoj el kemiaj fibroj plimultiĝis jaron post jaro.

Kun rapida disvolviĝo de malpeza industrio, precipe de loka industrio, pli kaj pli abundas kaj varias la industriaj vivbezonaĵoj. La provizaj kvantoj de la ĉefaj industriaj vivbezonaĵoj de la tuta lando kelkoble aŭ kelkdekoble pliiĝis respektive ol tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo. La varoj de grandaj magazenoj de Pekino, Ŝanhajo kaj Tiangin atingis 20,000-30,000 specojn kaj tiuj de vendejoj en kamparo atingis pli ol 3,000 specojn. Antaŭ la Liberiĝo nur malmultaj homoj povis aĉeti biciklon, brakhorloĝon, kudromaŝinon kaj radioricevilon, sed nun tiuj varoj jam fariĝis vivbezonaĵoj de la laboranta popolo kaj ilia vendokvanto pli kaj pli grandiĝas.

## MALALTAJ KAJ STABILAJ VARPREZOJ

En la malnova Ĉinio, inflacio kaŭzis mizerecon de la popolo. De julio de 1937 ĝis majo de 1949 la papermona kvanto pli-ol-140,000,000,000-oble plimultiĝis kaj la prezoj 8,500,000,000,000-oble plialtiĝis. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Partio kaj registaro persistis en la politiko de stabileco de prezoj sur la bazo de disvolvo de produktado, rapide ŝanĝis la situacion de salta altiĝo de prezoj de la malnova Ĉinio, tiel ke la prezoj de la tuta lando longe restas en stabileco.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, la prezoj de greno, kotona ŝtofo, manĝoleo, salo, karbo kaj aliaj vivbezonaĵoj ĉiam estis stabilaj. La prezoj de iuj industriaj vivbezonaĵoj eĉ iom post iom malaltiĝis. Por malpezigi la ŝarĝon de la popolo en pago por medikamentoj kaj altiĝi la nivelon de ilia sano, la ŝtato plurfoje malaltiĝis la prezojn de medikamentoj kaj drogoj de la ĉina medicino. En 1969 grandskala redukto de la la prezoj de medikamentoj estis farita en la tuta lando.

Surbaze de stabileco de prezoj, nia lando paŝon post paŝo reguligis la malraciajn prezojn en favoro al produktado kaj protekto al la interesoj de la popolo. Por rapidigi la disvolviĝon de agrikulturo, nia lando plurfoje altiĝis la aĉetajn prezojn de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj malaltiĝis la vendajn prezojn de produktaj materialoj bezonataj de agrikulturo. Nun la aĉetaj prezoj de la ĉefaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj plialtiĝis je pli ol 90% ol tiuj en 1950, tamen la vendaj prezoj de kemia sterko, insekticido, dizeloleo kaj aliaj materialoj bezonataj de agrikulturo reduktiĝis je triono aŭ du trionoj. Kvan-

kam la ŝtato plurfoje altiĝis la aĉetan prezon de greno, tamen la venda prezo de greno ĉiam restas stabila. La diferenco inter venda kaj aĉeta prezoj kaj la kosto por administrado estas pagitaj de la ŝtato, tiel ke la vivnivelo de la urbaj loĝantoj ne estas influita. La reguligo de prezoj favoras la tutlandan popolon.

Kun altiĝo de la aĉetaj prezoj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj kaj malaltiĝo de la vendaj prezoj de industriaj produktaĵoj multe malgrandiĝis la diferenceco inter la prezoj de industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj postlasita de la historio. La diferenco en 1971 reduktiĝis je pli-ol-40% kompare kun tiu en 1950. Dank' al tio kamparanoj povas akiri pli multe da industriaj produktaĵoj kontraŭ la sama kvanto da agrikulturaj produktaĵoj. Antaŭ la Liberiĝo, por 0.5 kilogramo da salo kamparanoj de iuj regionoj devis pagi dekojn da kilogramoj da greno, sed nun nur pli ol 0.5 kilogramon da greno. Kun la malgrandiĝo de la preza diferenco inter la industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj, senĉese plimultiĝis la enspezoj de la kamparanoj, plivastiĝis la kampara merkato kaj pliraciĝis la interŝanĝo de agrikulturaj kaj industriaj produktaĵoj, tiel ke pliapaŝe fortiĝis la kolektiva ekonomio de la popola komunumo kaj firmiĝis la alianco inter la laboristaro kaj kamparanaro.

Dank' al pliboniĝo de la vivo de la vastaj popolamasoj, multaj el ili deponas superfluan monon en bankoj, tiel ke grandskale kreskis la sumo de deponita mono en la tuta lando. En la kuranta jaro la deponita monsumo de la pekina kaj ŝanhaja popolo plimultiĝis. En la unuaj 7 monatoj de la kuranta jaro, la nove deponita monsumo de Pekino kreskis je 28.7% kompare kun tiu en la

*En la Unua Magazeno de Ŝanhajo abundas variaj specoj de kotonaj kaj kemifibraj teksaĵoj.*







*En sia ekspozicio de vestoj Hongŝan-magazeno de Urumĉi, Hingiang, prove vendas novajn produktaĵojn kaj petas opiniojn de diversnaciecaj popoloj.*

tuta jaro pasinta. En la unuaj 8 monatoj, ĉijare, en Ŝanhajo estis 493,000 novaj deponantoj kaj la totala sumo de la deponita mono de la tuta urbo superis tiun de la sama periodo de la pasinta jaro je 8.5%.

### **PLI BONA SERVO DE LA KOMERCAJ LABORANTOJ AL LA POPOLO**

Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ "disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon", la vastaj amasoj de komercaj laborantoj profundiĝis en kamparon, helpas komunumojn kaj produktajn brigadojn fari produktan planon, racie aranĝi agrikulturon, forstokulturon, brutobredadon, flankokupojn kaj fiŝbredadon kaj ĝuste trakti la rilatojn inter greno, kotono, kanabo, silko, teo, sukero, legomoj, tabako, fruktoj, drogherboj kaj aliaj, ĝustatempe liveras al ili produktajn materialojn kaj aktive aĉetas agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn, kio forte akcelis la disvolviĝon de agrikulturo kaj flankokupoj. En multaj urboj, komercaj kaj industria branĉoj strikte kunlaboras por kune enketi bezonon de la merkato, fari provan vendadon de komercaĵoj, ekzameni ilian kvaliton kaj disvolvi sintezan utiligon de materialoj. Laŭ la bezono de la disvolviĝanta industria produktado,

komerca branĉo aktive helpas ĝin solvi la problemon de krudaj materialoj kaj komunikas al ĝi opiniojn de amasoj. Laŭ la bezono de la merkato, la industria branĉo aktive disvolvas novan teknologion, produktas novajn specojn de varoj kaj ĉiurimede altigas ilian kvaliton. La strikta kunlaboro de la industria kaj komerca branĉoj akcelis la disvolviĝon de industrio kaj garantias provizon de bezonaĵoj al la popolo.

La komercaj laborantoj ĉiamaniere plibonigas sian servadon. Multaj bazaj magazenoj reguligis sian laboran tempon laŭ la bezono de la klientoj, plimultigis siajn varspecojn kaj vastigis la servan kampon. Ili servas al la klientoj ne nur per vendado sed ankaŭ per riparado, ne nur en la magazenoj sed ankaŭ en iliaj hejmoj. En stacioj, havenoj kaj ĉefaj stratoj de la urboj oni establis diurnajn aŭ nokt-matenajn butikojn kaj en kamparo agentajn vendejojn kaj aĉetejojn. Ĉio ĉi tio multe favoras la amasojn kaj estas varme akceptata de ili.

La prospero de la merkato kaj plibonigo de la popola vivo de nia lando spegulas la zorgon de la Partio kaj ŝtato al la popolo kaj manifestas la superecon de la socialisma sistemo.

# Nadmu-foiro sur Stepo de la Interna Mongolio

**E**N la lasta tagdeko de julio de la kuranta jaro, kun ĝojo post riĉa rikolto la diversnaciaj terkulturistoj kaj paŝtistoj (ĉefe mongoloj) de Ĝarud-ĥoŝo\* de Gilin-provinco okazigis sur Horĉin-stepo tradician Nadmu-foiron. "Nadmu" signifas amuzan kunvenon de laboruloj en la mongola lingvo. Sed antaŭ la Liberiĝo, ĝi donis nur ŝancon al la mal-

multaj brutoposedantoj por festeni kun siaj parencoj kaj amikoj kaj fari diservon, dum la sklavoj devis plenumi diversajn servojn por ilia diboĉado.

La vasta Horĉin-stepo abundas je herboj kaj akvo. Pelante grasajn bovojn, ŝafojn kaj ĉevalojn, paŝtistoj kantante venis de diversaj lokoj al la foiro,



*Maŝinoj por herbofalĉado, akvo-pumpado kaj draŝado en la Nadmu-foiro por kontentigi la bezonojn de la paŝta regiono.*

tenante ruĝajn flagojn kaj kunportante siajn jurtojn sur veturiloj. La kvietaj stepo subite ekbolis kaj ĉie regis atmosfero de festo.

## INTERŜANĜO DE KOMERCAĴOJ

Inter la partoprenantoj de la foiro en la kuranta jaro, krom diversnaciaj terkulturistoj kaj paŝtistoj de Ĝarud-ĥoŝo, sin trovis ankaŭ terkulturistoj, paŝtistoj kaj laboristoj de aliaj ĥoŝoj. Per abundaj komercaĵoj kaj variaj artaj kaj sportaj aktivadoj la Nadmufoiro manifestis la bonegan situacion de vigla prosperiĝo de la ekonomio kaj kulturo en tiu regiono de nacimalplimulto, en la brilo de la nacia politiko de la Partio.

Komercado estas grava parto de la enhavo de la foiro. Por subteni la socialisman konstruadon de la lando kaj pliapaŝe disvolvi produktadon, mongolaj paŝtistoj venis de dekoj eĉ centoj da kilometroj


malproksime kondukante brutojn de siaj grupoj al la foiro. La venditaj ŝarĝbrutoj kiaj ĉevaloj kaj bovoj, plejparte en serva aĝo, plenumas bezonojn de agrikulturaj regionoj de Gilin, Hebej kaj aliaj provincoj. En la kuranta jaro, kvankam la stepo estis trafita de eksterordinara sekeco, tamen dank' al kuna klopodado kaj interhelpado de la diversnaciaj kamparanoj kaj paŝtistoj, la brutobredado ricevis relative grandan disvolviĝon. La nombro de diversaj vivisukcesaj brutidoj de la tuta ĥoŝo pligrandigis je pli ol 40,000 kompare kun tiu de la pasinta jaro. Tre okupataj estis la laborantoj de la aĉeta stacio de bruto-produktaĵoj kaj lokaj produktaĵoj speciale starigita en la foiro, ĉar multaj kamparanoj kaj paŝtistoj de diversaj nacioj volis vendi siajn produktaĵojn al la ŝtato. Horĉin-stepo multe produktas ne nur lanon kaj felojn, sed ankaŭ abundas



*Artaj laborantoj dancas en la Nadmu-foiro.*

je sovaĝaj bestoj kaj vegetaĵoj kun ekonomia valoro. Dum sia energia disvolvado de la agrikultura kaj brutobreda produktado, la popolaj komunumoj sur la stepo vaste disvolvis kolektadon de sovaĝaj vegetaĵoj kaj ĉasadon de sovaĝaj bestoj. Dum la foiro, la ŝtato aĉetis grandan kvanton da junaj kaj maljunaj cervokornoj, diversaj kuracherboj, sovaĝbestaj feloj kaj aliaj.

Por kontentigi la bezonon de terkulturistoj kaj paŝtistoj, je kelkaj monatoj antaŭ la Nadmu-foiro, komercaj laborantoj de diversaj niveloj jam iris al aliaj lokoj de la tuta provinco por kolekti varojn kaj transportis per veturiloj diversajn varojn bezonatajn de terkulturistoj kaj paŝtistoj al Horĉin-stepo.



*Angulo de la bruto-vendejo de la Nadmu-foiro*

En la Nadmu-foiro, la vendejoj kaj vendstandoj estis abundaj je silkaĵoj, botoj, rubandoj por ornamaj vestojn, seloj kaj aliaj varoj speciale ŝatataj de naci-malplimulto. Kun la disvolviĝo de produktado, la aĉetpovo de la diversnaciaj popolanoj sur la stepo senĉese altiĝas. La totala kvanto de la venditaj varoj dum la Nadmu-foiro en tiu ĉi jaro estas plej granda en la historio. Kudromaŝinoj, brakhorloĝoj, radioriceviloj kaj aliaj havis grandan debiton.

### STEPA SPORTKUNVENO

En la Nadmu-foiro, okazis ankaŭ stepa sportkunveno, dum kiu iris konkursoj de luktado, rajdado, ŝnurtirado kaj surĉevala pafado de milicanoj. Inter ili, luktado estas la plej ŝatata de la paŝtistoj. Sed antaŭ la Liberiĝo, ĝi efektive estis tre barbara spektaklo. Por distri la brutoposedan-

tojn, luktantoj klopodis faligi sian rivalon, kaj la malvenkintoj ofte estis kruele batitaj aŭ eĉ mortigitaj de sia mastro. Hodiaŭ ĝi fariĝis sporto por fortigi la korpon kaj kulturi sagacon kaj kuraĝon de homoj.

Dum la lukta konkurso, plej multe aklamitaj estis la sportistoj Olzi Tomur kaj Caŭktu. Ili estas egalaj en forto kaj lerteco kaj streĉe luktadis kun obstineco, sed neniu povis faligi la alian. Fine oni devis juĝi ilian konkurson per la korpopezo kaj Olzi Tomur estis en supereco. Poste li venkis aliajn dekkelkajn rivalojn kaj gajnis la ĉampionecon de klasika luktado. Ĉu la forto kaj arto de Olzi Tomur kaj Caŭktu estis vere egalaj? Pri tiu demando Olzi Tomur mem diris: "Kvankam en forto kaj arto Caŭktu superas min kaj certe povas gajni la ĉampionecon de klasika luktado, tamen li rigardas min kiel gaston el malproksima loko, tial li ne volis faligi min.

Mi devas lerni de li." La vortoj de Olzi Tomur montris ilian novan moron.

## KORAJ KANTOJ DE PAŜTISTOJ

Dum la Nadmu-foiro, la Ĉangĉun-a Filmstudio kaj la filmluda administrejo alsendis kolorajn filmojn de la revoluciaj modernaj baletoj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj *Blankhara Knabino* kaj la revoluciaj modernaj pekin-operoj *Sagaca Kopto de la Tigra Monto* kaj *Ruĝa Signal-lanterno*. Ankaŭ la Ensemblo de Ĉirimu-ligo kaj la arta trupo Ulamuĉi de Ĝarud-hoŝo prezentis tre riĉajn kaj variajn programerojn por la terkulturistoj kaj paŝtistoj.

Iutage, dum la prezentado de la arta trupo de Ĝarud, subite iu mezaĝulo en mongola kostumo prunteprenis kvarkordan muzikilon de Raŝi, membro de la trupo, kaj venis sur la scenejon. Tiam, la rigardantoj varme manklakis al li kaj kriis: "Kantu, Ĉoĝi Gava!"

La nomo kaj kantoj de Ĉoĝi Gava estas nefremdaj por la popolanoj sur Horĉin-stepo. De sia mizera infaneco Ĉoĝi Gava ŝatis kanti, sed nur post la Liberiĝo li kantas kun kora ĝojo. En la pasintaj

pli ol 20 jaroj, li gaje vivis kaj kantis sur la stepo kaj estas nomata de la paŝtistoj "nia rakontisto".

Dum tiu ĉi Nadmu-foiro, multaj homoj gastis en lia felta jurto. Ankaŭ gvidantoj de la ligo kaj hoŝo venis vidi lin kaj kuraĝigis lin fari kreadon. Lin plej kortuŝis tio, ke membroj de la arta trupo de Ĝarud-hoŝo invitis lin kune fari prezentadon dum la foiro. Kun forta emocio, li ekkantis plengorge mem akompanante sin per la kvarkorda muzikilo.

*La brila venko de l' kultur-revolucio  
inspiris novan penson al Nadmu-foiro;  
laŭ la revoluci-lini" de Prezidanto Maŭ  
antaŭen marŝas la paŝtistoj de Ĥorĉino.*

*Neniam ni forgesos la favoron de la granda  
Kompartio;  
eternan vivon al vi, Prezidanto Maŭ!*

La kanto de Ĉoĝi Gava rikoltis varman akklamadon de la rigardantoj. Li ne nur prikantis la foiron sur la stepo sed ankaŭ aŭdigis la koran senton de la terkulturistoj kaj paŝtistoj de Horĉin-stepo!

---

*\*Hoŝo—administra unuo de gubernia nivelo en la  
Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.*

*Mongolaj paŝtistoj faras amikan luktadon.*



# Komerca Kooperativo de Ĝajgeda

**L**A malgranda Komerca Kooperativo de Ĝajgeda sin trovas en Tajjue-montregiono de Ŝanhi-provinco kaj havas 50 personojn. Sub direktado de la principo de Prezidanto Maŭ “**disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon**”, ili diligente batalas dum dekoj da jaroj kontraŭ malfaciloj por servi al la konstruado de nova socialisma montregiono kaj estas laŭdataj kaj amataj de vastaj amasoj.

En disvolvo de la tiea agrikultura produkto, la plej granda malfacilaĵo estis manko de brutaj fortoj. La plejparto de la Ĝajgeda-anoj venis ĉi tien de aliaj lokoj antaŭ la Liberiĝo por fuĝi de malsato. Ĉiu el ili loĝis en kaverndomo, ne bredis brutojn kaj porkojn, kaj la pomua produktokvanto de greno estis nur 35-40 kg. eĉ en riĉa rikolto. Por subteni disvolvon de la produkto de la montregiono, la kooperativo aĉetis ĉevalinojn kaj aliajn ŝarĝbrutojn kaj helpis gvidantojn de komunumo mobilizi produktajn grupojn mem generigi kaj bredi ŝarĝbrutojn. Tamen neatendite, la produktaj grupoj konkure aĉetis mulojn kaj bovojn, sed neniu volis bredi ĉevalinojn. Kial? Tie cirkulis onidiro, ke ĉevalino ne povos naski idon, se ĝi trinkos tian akvon. Liu Ĵongŝeng, sekretario de la partia filio de la kooperativo, estas unu el ĝiaj fondintoj. En la Kontraŭjapana Rezistmilito li kune kun kelkaj kamaradoj vektportis urĝe bezonatajn salon, kotonon kaj ĉiutagajn vivbezonaĵojn tra la blokada linio de malamiko, riskante sian vivon. Nun, vizaĝe al la malfacilo li diris decideme, ke ni, komunistoj, ne estas superstiĉaj kaj nepre generigos mulojn kaj ĉevalojn en la malriĉa montregiono. Li mem funkciis kiel la unua parigisto de Ĝajgeda-komunumo. Sub la helpo de koncerna fako de la komunumo 17 brigadoj de la komunumo fondis sian brutoreproduktejon kaj 9 parigajn staciojn, post kelkjara klopodo. Antaŭ la Liberiĝo, en radiuso de 125 km. ĉirkaŭ tiu loko estis nur du ĉevaloj de bienuloj por kolekti renton. Kaj nun la komunumo

ne nur solvis la problemon de manko de ŝarĝbrutoj, sed ankaŭ povas ĉiujare provizi aliajn komunumojn per pli ol 300 ŝarĝbrutoj, tiel ke ĝi fariĝis unu el la produktaj bazlokoj de ŝarĝbrutoj de Ŝanhi-provinco.

Post disvolviĝo de la amasa movado lerni de Daĝaj en agrikulturo, ĉiuj kadroj kaj komunumanoj de Ĝajgeda-komunumo maltrankviliĝis pro nepliiĝo de la grena produktokvanto. Foje, laborantoj de la kooperativo vizitis iujn lokojn en la sudorienta parto de Ŝanhi-provinco kaj trovis, ke la produktokvanto de tiea hibridigita sorgo estas alta. Krome ili rimarkis, ke en ĝia norda parto terpomo kreskas bone. Post esplorado ili komprenis, ke en la pasinteco oni atentis nur pri grundo, sterko kaj akvo, sed neglektis semojn. Ili iniciative sendis laborantojn aliloken por aĉeti bonspecajn semojn kaj kune kun komunumanoj provis kulturi kaj plivastigi la semojn. Nur en la pasinta jaro estis enkondukitaj pli ol 20 specoj de bonaj semoj de grenoj. Por pliiĝi la produktokvanton, produktaj grupoj aplikis aliajn rimedojn. Dank’ al ĉio ĉi tio, la pomua produktokvanto de greno en 1971 pliiĝis ĝis 250 kg. En tiu montregiono, ne estis facile enkonduki bonajn semojn. Ni prenu la aĉeton de terpomoj kiel ekzemplon. En la unua fojo ili aĉetis kaj transportis generajn terpojmojn antaŭ la planta tempo, multaj el la terpojmoj estis neatendite frostigitaj, ĉar tiam ankoraŭ estis malvarme en la montregiono. Estus tro malfrue, se oni prokrastas la aĉeton ĝis la alveno de varmaj tagoj. Tiam iuj perdis memfidon kaj plendis, ke tio estas memĝenado kaj vana laboro. Gvidantoj kaj kelkaj kamaradoj de la kooperativo pacience kuraĝigis ilin: Por konstrui la montregionon kune kun komunumanoj, ni ne devas timi malfacilojn. Poste ili aĉetis generajn terpojmojn en la rikolta sezono kaj konservis ilin en kelo por eviti froston. En la sekvanta jaro finfine ili akiris altan produkton de terpomo.

Iufoje maljuna kamparano Li Jinghi malsaniĝis kaj volis manĝi rizkaĉon. Sed tiam en la mont-regiono ne estis rizo. La kooperativo speciale aĉetis kelkajn kilogramojn da rizo kaj sendis ĝin al lia hejmo. Liu Ĵongŝeng, sekretario de la partia filio de la vendejo, persone iris vidi lin. La maljunulo prenis lian manon kaj diris: “En nia montvalo la rivero estas ordigita kaj novaj kampoj estas formitaj, sed la akvo forfluas senutile. Ĉu ni ne povas mem kulturi rizon?” Reveninte, Liu Ĵongŝeng longe meditis. Li opiniis, ke la ideo de la maljunulo estas tre bona. Se en la montregiono oni povos kulturi rizon, ne nur ĝiaj pli ol mil familioj povos manĝi rizon, sed ankaŭ la pomua produktokvanto de greno pliiĝos.

En la unuafoja prova kulturado de rizo sur duona muo da kampo, la plantoj mortis antaŭ ekfloro pro prujno. Duafoje, kiam la rizplantoj ekgrajniĝis, ili same mortis de frosto. La kadroj ne ŝanceliĝis, ĉerpis la instruon kaj daŭrigis sian provon. Sub la subteno de la partia komitato de la komunumo kaj vastaj amasoj de komunumanoj, ili elektis alian rizosemon de mallonga kreska tempo kaj konvenan al tiea klimato. Finfine la tria provo sukcesis. En la pasinta jaro, la pomua produktokvanto de rizo en malgranda areo atingis pli ol 440 kg. Komunumanoj diris: “Se ni havas la spiriton de kamaradoj de la kooperativo, la montregiono de Ĝajgeda certe povos fariĝi riĉa.

En Ĝajgeda estas multaj valoj kaj krutaj montoj. En longa tempo la loĝantoj kutimiĝis al tiu mizera fizionomio kiu ŝajnis al ili neŝanĝebla. Foje laborantoj de la kooperativo vizitis Ŝibanjan-kooperativon de Linhian-gubernio de Henan-provinco por lerni ĝian avangardan progresan sperton. Tieaj montoj estas pli krutaj kaj ŝtonozaj ol tiu de Ĝajgeda, sed sur ili kreskas fruktarboj kaj arboj por ligno. Kial la malriĉa fizionomio de Ĝajgeda-montregiono sub la samaj kondiĉoj estas neŝanĝebla? De tiam laborantoj de la kooperativo aĉetis diversajn fruktarbidojn kaj kune kun komunumanoj plantis ilin, aktive propagandante la bonojn de plantado de fruktarboj al kadroj kaj komunumanoj. Post kelkaj jaroj la arboj jam ekfruktis, sed la fruktoj ne estis bongustaj. Komunumanoj petis, ke la kooperativo apliku rimedojn por reformi la arbojn. Ĝiaj laborantoj invitis teknikistojn de fruktoproktejo ke ili instruu, kiel administri kaj grefti fruktarbojn. Ili aĉetis bonspecajn fruktarbidojn de tiuj regionoj, kies klimato similas al tiu de Ĝajgeda, kaj helpis produktajn grupojn grefti arbojn kaj bongustigi la fruktojn.

Krutaj montoj, larĝaj valoj kaj multaj dezertaj deklivoj estas malbonaj kondiĉoj, sed en la profundaj montoj estas multaj fontoj de naturaj riĉaĵoj kaj estas granda latentaj fortoj de produkto. Tiuj bonaj kondiĉoj mankas al la ebenejoj. Sub la aktiva helpo de la kooperativo produktaj grupoj komencis entrepreni diversajn produktajn aktivadojn. Ĉi tie en la montoj kreskas multaj kuracaj herboj, sed tre malmultaj homoj ilin kolektis. Por ŝanĝi la staton, laborantoj de la kooperativo ofte fondiĝis en kamparon kaj aĉetis kuracajn herbojn de produktaj grupoj kaj komunumanoj, dume ili ankaŭ enkondukis kuracajn herbojn de aliaj lokoj kaj helpis komunumanojn provkulturi ilin. En la kuranta jaro, la areo de kurac-herbaj kampoj en la tuta komunumo atingis pli ol 200 muojn. La kooperativo aĉetis pli ol 50,000 kg. da plantitaj kaj sovaĝaj kuracaj herboj krom tiu kvanto, kiun la komunumo mem uzis kiel kuracilon.

En 1971, la popersona meznombra enspezo de la tuta komunumo nur en diversaj flankokupoj atingis 60 juanojn. Kun prosperiĝo de la montregiono, ankaŭ komerco pli vigliĝas. En 1971, la totala valoro de aĉeto kaj vendo de Ĝajgeda-kooperativo atingis pli ol 570,000 juanojn, t.e. pli-ol-unuoblo de tiu de aliaj najbaraj kooperativoj kun samaj kondiĉoj. Kun disvolviĝo de produkto, ankaŭ la tasko de aĉetado estis bone plenumita. En la pasinta jaro la aĉeta tasko de porkoj, ovoj kaj aliaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj estis superplenumita. Paŝon post paŝo disvolvante agrikulturon, forstigadon, brutobredadon kaj flankokupojn la nuna Ĝajgeda marŝas en prospero.





*Freŝaj legomoj por la merkato*

# La Legom-produkto de Nanta-brigado

BAJ CAJJUAN

**E**N la sudorienta antaŭurbo de Ŝenjang, Liaŭning-provinco troviĝas Nanta-brigado kulturanta legomojn. Ĝi havas 3,500 muojn da agroj kaj produktas ĉiujare pli ol 26,500,000 kilogramojn da legomoj, kiuj povas kontentigi la bezonon de pli ol 100,000 urbaj loĝantoj. Same kiel ĉiuj aliaj legom-brigadoj en la antaŭurbo de Ŝenjang, tiu ĉi brigado ĉiurimede klopodas por plimultigi specojn de legomoj kaj altigi ilian produktokvanton tiel ke Ŝenjang kun milionoj da loĝantoj efektivigis memprovizon de legomoj.

## ĜOJINDA SUKCESO

Someron de 1970, Nanta-brigado akiris riĉan rikolton de legomoj. La gvidantaj membroj de la partia ĝenerala filio de la brigado kaj veteranaj

legom-kulturistoj venis al legomvendejoj por peti opiniojn de klientoj. Ili rimarkis, ke multaj legomoj putriĝis pro ĝia troa koncentriĝo en vendejoj. Reveninte al sia brigado ili konsiliĝis pri tio kun aliaj komunumanoj. Iuj opiniis, ke ili havas nenian rimedon por solvi la problemon, ĉar la nordorienta Ĉinio havas mallongan senprujnan periodon kaj la legom-produkto estas nesimetria. Tamen veterana legom-kulturisto Vang Ĉunhiang diris: "La malfacilo, eĉ pli granda, povas esti solvita, se nur oni ĉiamaniere klopodas por trovi rimedon. Ni legom-kulturistoj ne devas esti katenitaj de la lokaj klimataj kondiĉoj." Post diskutado, ili venis al komuna kono, ke ili devas klopodi por efektivigi simetrian liveron de legomoj en la tuta jaro kaj neputriĝon de legomoj eĉ en abunda sezono. Surbaze de la sperto en plurjara plantado de lego-



moj, ili fine trovis serion da rimedoj post ripetada eksperimentado. Per pajlaj ŝirmiloj kontraŭ vento, plastaj membranoj kaj forcejoj, ili maturigis pli-frue je 40-50 tagoj iujn printempajn legomojn. Dank' al tio, eĉ en la plej frosta lasta tagdeko de januaro en Ŝenjang, la urbanoj jam povas manĝi *giucaj* (*Allium tuberosum*), ajlotigon kaj celerion, kaj en la degelanta aprilo kukumon, bazilion kaj kapsikon. Ili laŭvice semas kaj liveras al la merkato la somerajn legomojn. Ekzemple, ili laŭvice kulturis tomatojn respektive en frua, meza kaj malfrua maturiĝo, tiel ke la tomatoj troviĝas sur la merkato de la meza tagdeko de junio ĝis septembro. Precipe en la lastaj du jaroj, ili mem konstruis 8 cementajn kelojn, kiuj vintre povas konservi 10, 500,000 kilogramojn da brasiko ĝis la venonta aprilo. Per tio ili akiris sukceson en liverado de legomoj en vintro kaj printempo.

### PLIMULTIGO DE LEGOM-SPECOJ


Iun tagon, veterana legom-kulturisto kaj urba labormodelo Gju Lianŝeng transportis legomojn al urbo per ĉaro. Dum malŝarĝado de la ĉaro, li aŭdis de du sudanoj ke ili volas manĝi sialokajn legomojn. Tio altiris lian atenton. Li pensis ke multaj sudanoj venis al la Nordo por partopreni en la socialisma konstruado, ni legom-kulturistoj devas ĉiurimede multigi specojn de legomoj por kontentigi la bezonon de diversaj klientoj. Reveninte al sia brigado, li tuj diris tiun ideon al la partia ĝenerala filio. La lasta alte taksis tiun proponon, decidis organizi scienc-esploran grupon kun Gju Lianŝeng kiel estro kaj disponigis 5 muojn da tero al la grupo por kultura eksperimentado de legomoj. Krome la filio trifoje sendis Gju Lianŝeng al Pekino, Ŝanhajo, Ĉangŝa, Ĉengdu k.a. por fari vizitadon kaj lernadon, kaj li enkondukis pli ol 40 specojn da legomaj semoj de nia Sudo.

Por adapti la sudajn legomojn al la norda klimato kaj ilin kreskigi bone, Gju Lianŝeng ĉiam laboras sur la kampo spite de frosto kaj varmego en la tuta jaro. Ĉar mallonga estas la senprujna periodo en Ŝenjang-regiono kaj la vintro longas je pli ol 5 monatoj, multaj specoj de sudaj legomoj ne povis grajniĝi influite de la malalta temperaturo. Ekzemple, florbrasiko estas legomo kiu povas grajniĝi nur post vintro. Laŭ la klimato de Ŝenjang kaj post trijara eksperimentado, li plifruigis ĝiajn semadon kaj transplanton je ĉ. 20 tagoj ol tiuj en la Sudo. Kaj dank' al zorgema kulturado, florbrasiko fine grajniĝis. La nove kulturita

ŝenjang-a florbrasiko estas nutroza, bongusta kaj rezistiva kontraŭ malsanoj, kaj ĝia pomua produktokvanto atingis 3,500-4,000 kilogramojn.

En la lastaj jaroj, Gju Lianŝeng kune kun siaj grupanoj solvis la problemon pri negrajniĝo de bulbo kaj bazilio en la Nordo kaj elkulturis multajn hibridigitajn specojn. Ekzemple, per hibridigo de pekina *hugua* (*Lagenaria siceraria* var. *clavata*) kaj tangŝan-a kukumo, ili elkulturis kukumon "Nanta n-ro l", granda kaj rezistiva kontraŭ malsanoj kaj insektoj. Ĝia pomua produktokvanto atingis pli ol 5,000 kilogramojn, kaj ĝi jam estas disvastigita al aliaj provincoj kaj regionoj. Nun, sur kampoj kaj en forcejoj de Nanta-brigado oni povas vidi la ŝanhajan florbrasikon, guangĝoŭ-an *vengcaj* (*Ipomoea aquatica*) kaj *dadaŭdoŭ* (*canavalia gladiata*), ninghia-an verdan kapsikon, hiamen-

*Fridado de mem breditaj kokoj por eksportado en la brigada kok-buĉejo*



an brasikon kaj aliajn cent specojn de legomoj transplantitaj de diversaj lokoj de la tuta lando kaj fremdaj landoj.

Ĉiujare la brigado rikoltis pli ol 25,000 kilogramojn da legomaj semoj, per kiuj ĝi provizis ne nur sin mem sed ankaŭ Ŝandong, Hebej, Gilin kaj Vuhan.

### KORTOBIRDA BREDADO

Nanta-brigado ĉiujare vendas al la ŝtato kelkdek milionojn da kilogramoj da legomoj, krome, ĝi donis atenton ankaŭ pri la kortobirda bredado kaj aliaj flankokupoj.

En la jaro 1965, la brigado starigis kokobredejon. Ĝi bredas 5,000 porgenerajn kokinojn per bonkvalitaj nutraĵoj. Inter tiuj sin trovas nova speco

de orflava kaj lanugbula kokino granda kaj grasa, kiu kreskas rapide kaj pezas 1.5-2 kilogramojn nur post ĉ. 80 tagoj, kaj krome ĝi multe demetas ovojn kaj ne timas frostiĝon.

La bredejo povas produkti ĉiujare 380,000 porgenerajn ovojn kaj havas sian elovigejon kun kvar elektraĵ elovigiloj, kiu ĉiujare povas elovigi 48,000 kokidojn. La kokidoj estas bredataj en bredejoj de ĝiaj produktaj grupoj, kaj kiam ili maturiĝis, oni sendis ilin al la brigada buĉejo. La brigado ĉiujare povas produkti 200 tunojn da glaciujmita kokaĵo, kies granda parto estas por eksportado.

Tiu ĉi brigado ankaŭ bredas multajn mulojn, ĉevalojn kaj porkojn, fiŝojn kaj anasojn, kulturigas diversajn fruktoarbojn. Iu fremdlanda ĵurnalisto ĝoje diris post vizito: "Mi vidis mirindan popolkomunumon."



*Resumado de sperto pri riĉa rikolto de tomatoj*

# *Danghjong-stepo en Prospero*

Danghjong troviĝas en la suda parto de la stepo de norda Tibeto. En la malnova socio, la paŝtistoj sur la stepo mez-nombre alta je 4,500 metroj super la mara nivelo suferegis ekspluatadon kaj subpremado de la reakcia reganta klaso. Post la Liberiĝo, la paŝtistoj en tiu regiono fariĝis mastroj. Hodiaŭ, la fekunda Danghjong-stepo abundas je brutaroj kaj la popolo vivas en feliĉo. Kun tendoj starigitaj apud lagoj kaj riveroj, la paŝtistoj kreskigas gregojn de bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Ili liveradas al la ŝtato abundajn produktaĵojn kiaj estas lakto, viando, butero, felo kaj lano. Ĉiujare, kiam la paŝtistoj ricevas pliprodukton de ŝafidoj, ili okazigas tradician kunvenon por ĉevalkonkurso kaj dancado por festi la sukcesojn de sia laboro, prikanti Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio kaj ilian feliĉan vivon.

Milicanino Suona Kjuĝu



Ĉevalkonkurso kaj rajdprezentado estas ŝatataj aktivadoj de la paŝtistoj.








Melkado de bovoj



Tibeta kuracisto ekzamenas malsanan paŝtistinon.



Bovaroj kaj ŝafaroj sur la stepo



Lernantoj de la Elementa Lernejo de Guoking-komunumo



# Nokta Veturo sur

## Hianggiang-rivero

**P**OST kiam mi trovis en la antaŭa kajuto liberan sidlokon kaj demetis mian simplan pakaĵon, mi iom spiris kviete kaj rimarkis, ke kontraŭ mi sidas maljunulino pli-ol-kvindek-jara. Ŝi estis fikse rigardanta min per intima rigardo. “Kien vi veturas, onklino?” mi alparolis. “Al Ĉenpoĝou.” ŝi respondis ridante. Aŭdinte ke ŝi parolas en dialekto de la Dongtinghu-a regiono, mi demandis plue: “Ĉu al la hejmo?” Ŝi jesis kaj poste diris al mi: “Mi iris al Ĉangŝa por vidi mian filon, kiu jam du jarojn ne revenis hejmen. Mi restadis tie dekkelkajn tagojn. Mi tre ĝojas, ke li plifortikiĝis. Timante ke la stomaka malsano atakos min sur la vojo, li petis de superuloj forpermeson por min akompani survoje . . .”

Tiam, iu soldato alportis al ŝi glason da bolinta akvo kaj diris: “Iom trinku!” Mi pensis, ke tiu ĉi certe estas ŝia filo.

La onklino transprenis la glason per unu mano, ektiris manikon de la soldato per la alia kaj diris montrante la liberan sidlokon: “Sidiĝu kaj iom ripozu.” Sed, apenaŭ sidiĝinte la soldato denove stariĝis maltrankvile. “Baldaŭ ekveturos la ŝipo,” li diris al la maljunulino, “mi iras demandi, ĉu ankoraŭ restas libera kuŝloko.” Rigardante lian dorson, la maljunulino senrimede diris: “Por kio mi bezonas kuŝlokon, se ĉi-nokte mi jam elŝipiĝos?” Ŝi daŭrigis sian parolon post paŭzo: “Estis tre malfacile vojaĝi en la malnova socio, por ne paroli pri akiro de kuŝloko. . .”

“U! — ” fajfante ekmoviĝis la ŝipo. Tiam mia brakhorloĝo ĝuste montris la dekduan de la nokto. Tiutage estis multe da pasaĝeroj. Kvankam la ŝipo jam iris longe, tamen la kajuto ankoraŭ brudis. Maljuna deĵora servisto sciigis al la pasaĝeroj aten-

tigojn pri nokta veturado.

Post nelonge la soldato revenis kaj diris kun bedaŭro: “Ĉiuj biletoj por kuŝloko estas forvenditaj.” La maljunulino interrompis lin kortuŝite: “Nun jam estas sufiĉe komforte por mi. Ĵus mi diris al tiu kamarado, ke ni ŝuldas dankon al la bona gvidado de Prezidanto Maŭ ke nun ni laboruloj povas vojaĝi en tiel vasta ŝipo!” La soldato prenis sian sakon de sur sia sidloko kaj diris al la onklino: “Vi estas grandaĝa kaj fartas nebene, do kuŝu sur la benko kaj bone ripozu!” La lasta demandis maltrankvile: “Kie vi ripozu?” “Mi serĉos alian sidlokon!” Parolante la soldato foriris.

La ŝipo brudis monotone en la nokto kiel lul-kanto. Kaj mi apogis mian kapon sur la dorsapogilo de la benko kaj iom post iom endormiĝis. Post vekigo mi malfermis miajn okulojn kaj vidis, ke la onklino ankoraŭ kuŝas sur la benko. Poste mi levis mian kapon kaj trovis, ke sub la lampo staras homo sin apoganta sur la kajutmuro, kaj absorbite legas iun libreton. Li estas neniu alia ol la dirita soldato.

Subite la maljunulino sin turnis kaj ekĝemis. Sur ŝia frunto aperis ŝviteroj kaj ŝiaj brovoj kuntiriĝis. Mi tuj vokis la soldaton: “Venu tuj, la onklino malsaniĝis!” La soldato tuj alkuris per grandaj paŝoj kaj samtempe elprenis sian viŝtukon por forviŝi al ŝi la ŝviton. “Ĉu la stomako doloras vin?” li demandis mallaŭte. Anstataŭ respondi, la maljunulino nur premis la bruston per unu mano kaj ĝemadis mallaŭte. Nun la soldato alkondukis maljunan deĵorantan serviston kaj la lasta opiniis, ke ŝi grave malsaniĝis. “Mi tuj serĉu kuraciston per megafono!” La servisto foriris kaj baldaŭ anoncis per la aparato: “Kamaradoj, en nia ŝipo iu maljunulino malsaniĝis. Kiu estas kuracisto, rapidu al la antaŭa kajuto! . . .”



Tuj poste ĈPLA-anino kun du harligoj iris el la pasaĝeroj. Ŝi rapidis al la maljunulino kaj ekzamenis ŝiajn palpebrojn, pulson kaj ventron... Post tio ŝi elpoŝigis pinglujon, prenis el ĝi arĝentan pinglon kaj lerte faris al la malsanulino akupunkturton. Estis mirinde, ke post kelkaj pikoĵoj la malsanulino jam malfermis siajn pugnojn, ĉesis ĝemi kaj kvietiĝis. En tiu tempo ankaŭ la maljuna servisto revenis kaj demandis demalproksime: "Ĉu kuracisto venis?" "Venis!" ĝoje respondis la juna soldato. Sed la ĈPLA-anino klarigis: "Mi estas ne kuracistino, sed sanitaristino." La servisto diris haste: "Tute egale, ĉu kuracistino ĉu sanitaristino, tuj helpu!" "Ŝi jam tion faris sukcese!" diris la soldato. La servisto rigardis la resaniĝintan maljunulinon kaj diris admire: "Brave!" Poste li turnis sin al la pasaĝeroj kaj konsilis: "Kamaradoj, dankojn pro viaj zorgoj. Bonvolu reveni al viaj sidlokoj por ripozi!"

La pasaĝeroj disiris, tamen la sanitaristino restis ĉe la malsanulino. Ŝi mallaŭte alvokis la soldaton por ke li iru preni bolintan akvon, kaj apogigis la onklinon al sia brusto. Tuj poste la soldato alportis akvon. Tiam la sanitaristino diris al li: "Kamarado, mi flegu la onklinon! Vi ripozu sur mia benko!" La soldato povis nur cedi kaj iri al ŝia sidloko.

La malsanulino rekonsciiĝis kaj fikse rigardis la fremdan sanitaristinon kun dankemo.

Tagiĝis. La matenaj sunradioj enpenetris tra ŝipfenestroj. La juna soldato alvenis kaj komencis senvorte ordigi pakajojn de la maljunulino. Vidinte tion la sanitaristino demandis kun zorgemo: "Kiom da kilometroj la onklino devas iri post elŝipiĝo?" Kun necerteco la lasta respondis: "Eble pli ol 10." Post pripenso la junulino elprenis kelkajn tablojdojn el sia medikamentujo, pakis ilin per papero kaj donis al la soldato, dirante: "Se la onklino survoje sentos doloron, helpu ŝin preni po du tablojdojn ĉiufoje." Tamen la onklino diris: "Donu ĝin al mi mem!" La soldato daŭrigis ordigon de la pakajo kaj post tio komencis ordigi siajn objektojn. Vidinte tion, la maljunulino miris kaj demandis: "Ĉu vi ne elŝipiĝos ĉe Maŭcaŭgie? Kial vi tiel frue kolektis vian pakajon?"

La lasta diris: "Mi volas akompani vin al via hejmo. Mi jam informiĝis, ke oni povas elŝipiĝi survoje kaj veturi per sekvonta ŝipo, se li havas urĝan aferon." La maljunulino maltrankviliĝis, prenis la manon de la soldato kaj diris emocie: "Bona knabo, vi hejmeniru! Mi neniel malhelpu viajn aferojn!" Tamen la soldato insistis pri elŝipiĝo kaj diris: "Ĉu mi povus trankvile lasi vin hejmeniri sola?!" La maljunulino neniel konsentis kaj firme diris: "Mi tute ne bezonas vian helpon!"

Ilia dialogo mirigis min kaj la sanitaristinon. Kiam mi volis demandi pri tio, la maljunulino sin turnis al mi dirante: "Kamarado, admonu lin ne iri por akompani min." "Kio? Ĉu li ne estas via filo?" Mire mi demandis. Montrante la soldaton la onklino dankeme diris: "Mi konatiĝis kun tiu ĉi kamarado ĉe la haveno. Mia filo estas pontkonstruisto, kiu nun klopodas konstrui pontegon



super Hianggiang-rivero. Gvidantoj jam permesis al li akompani min reveni hejmen, tamen hieraŭ posttagmeze la konstrueja administracio alvokis la laboristojn ke ili finkonstruu la pontegon antaŭ la inunda sezono. Pro tio li decidis resti kaj lasis min hejmenreveni sola. La filo akompanis min al la haveno kaj ni konatiĝis kun tiu ĉi kamarado . . .” Tiam la soldato interrompis ŝin per argumento: “Ŝia filo pene laboras por la socialisma konstruado kaj konfidis sian patrinon al mi. Ĉu mi povas forlasi ŝin survoje?” “Mia filo nur petis ke vi akompanu min ĝis Ĉenpoĝou!” diris onklino. “Sed nun vi estas malsana . . .” argumentis la soldato devkonscie.

En tiu momento subite eksonis la megafono: “Nia ŝipo venas al Ĉenpoĝou!”

La ŝipo alordiĝis. La soldato jam pretis por

elŝipiĝi kun la pakaĵo de la onklino en sia mano. Tiam iu pliaĝa alta ĈPLA-ano aliris kaj diris al li: “Vi jam plenumis vian taskon. Mi akompanu la onklinon anstataŭ vi, ĉar mi elŝipiĝos ĉe Ĉenpoĝou, por viziti parencojn. Estu trankvila, mi certe akompanos ŝin ĝis la hejmo. Mi jam aŭdis vian interparolon kaj devas lerni de vi.” Ne atendente respondon, la alta soldato demandis kun mallevita kapo al la onklino pri ŝia adreso. Informiĝinte ke ŝia hejmo estas en Bajmaŭping, li diris ridetante: “Mia hejmo estas en Huangmaŭping nur je 1.5 kilometroj for de via hejmo. Do saman vojon ni iros. La ŝipo jam alordiĝis, ni elŝipiĝu tuj!”

La ŝipo ekiris denove. La ruliĝanta Hianggiang-rivero sin prezentis pli brila kaj bela en la matenaj sunradioj. Mi ne povis min kvietigi de emocio rigardante la dorsojn de la forirantaj onklino kaj ĈLPA-ano.



## En Pasaĝera Trajno

JANG BINGHAJ

**L**A konduktora grupo de la 213-a—214-a trajno de la pasaĝera sekcio de la Datong-a Fervoja Filia Administracio respondecas pri la transportado de pasaĝeroj inter la urboj Datong de Ŝanhi-provinco kaj Pekino. Ekde sia fondiĝo en julio 1970, la grupo ĉiamaniere klopodis por plibonigi sian servadon kaj ricevis varman laŭdon de pasaĝeroj.

### KIAL NE ESTAS KRITIKOJ EN LA KAJEROJ POR OPINIOJ?

La grupo pendigis po unu opinionan kajeron en ĉiu vagono. Tamen en kompare longa tempo,

la konduktoroj trovis en ili nur laŭdojn, sed neniun kritikon aŭ proponon. Tial ili pensis, ke ili bone plenumis siajn laborojn. Tia fenomeno daŭris certan tempon kaj altiris ilian atenton. Kial pasaĝeroj ne donis al ili kritikajn opiniojn? Post serioza analizado, ili konstatis, ke la kaŭzo kuŝas en tio ke mankas al ili forta deziro por plibonigi la servadon. La tuta veturado de la trajno en tiu sekcio bezonas 10 horojn, dum kiuj ili ne kolektis opiniojn escepte de la momento antaŭ la atingo de la fina stacio, kiam ili faris ĝentilan formalan peton per megafono: “Pasaĝeroj, bonvole donu al ni viajn valorajn opiniojn.” Tiam al la pasaĝeroj, kiuj devis zorgi pri siaj pakaĵoj por descendo, ja mankis tempo por tion fari. La kajeroj por

opinioj do fariĝis formalajo. Trovinte la kaŭzon, ili tuj provis plibonigi sian servon. Ili pli multigis la fojojn de kolektado-de opinioj per megafono, kaj sub gvido de la trajnestro ili ofte kolektas opiniojn de pasaĝeroj dum balaado, liverado de trinkakvo kaj manĝaĵo kaj librovendado. Iuj pasaĝeroj diris, ke la novaj konduktoroj scias nenion pri la lokoj apud la fervojo kaj ne povas respondi demandojn de pasaĝeroj. Ili trovis la opinion prava kaj faris kompletan enketon pri la horaroj de diversaj aŭtobusaj linioj en tri urboj kaj ok gubernioj ambaŭflanke de la fervojo, kaj antaŭtempe anoncis precize al pasaĝeroj la koncernan parton. Kaj per pli ol du monatoj, ili detale enketis pri la dislokiĝo de la fabrikoj, minejoj, oficejoj, lernejoj kaj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo de 46 grandaj kaj malgrandaj stacioj de la fervojo kaj faris skizan mapon, kiun ĉiu grupano kunportas por helpi la vojaĝantojn. Tio estas multe bonvenigata de la lastaj. Iu kamarana onklino volis iri al Hiangŝujpu kaj aĉetis en Pekino pasaĝeran biletan por Hjuanhua. Pri tio konduktorino Hju Jing informiĝis kaj diris al la onklino, ke Hiangŝujpu distancas de Hinĝuangzi nur unu

kilometron, kaj se ŝi descendos en Hjuanhua-stacio, ŝi devos returnen iri 15 km. "Dankon! Mi do descendos ĉe Hinĝuangzi-stacio." ĝoje diris la onklino. "Se vi ne sciigus tion al mi, hodiaŭ mi devus iri longan vojon senbezone."

Krome, la konduktoroj zorgeme enketis pri bezonoj de la pasaĝeroj kaj faris plian enketon pri la hoteloj, restoracioj kaj stacioj de aŭtobusaj linioj, kio pli perfektigis ilian servadon.

### PLI RIGORA MEMKRITIKO POST ĈIU LAŬDO

Pro senĉesa plibonigo de la servado, la konduktora grupo ricevis multajn laŭdojn kaj dankajn leterojn de pasaĝeroj. Kiel do oni traktu tion ĝuste?

En la fino de marto de la kuranta jaro, iu ĈPLA-ano descendis ĉe Ŝalingzi-stacio kaj forgesis sian surtuton en vagono. Kiam li rimarkis tion, la trajno jam forveturis. Informiĝinte pri tio ĉe la sekvanta stacio, konduktorino Lju Fengjing de

*Servo al la pasaĝeroj*



la sesa vagono traserĉis 4 vagonojn en la meza parto de la trajno kaj fine trovis la surtuton, kaj poste transdonis ĝin al la perdinto. Neatendite, post nelonge, du senditoj de la trupo en kiu servas la perdinto venis al la trajno por esprimi sian dankon al la kondukto grupo kaj informiĝi pri la serĉado de la surtuto kaj pri bona servado de Lju Fengjing por eduki per la ekzemplo batalantojn en lernado de la popolamasoj. Aŭdinte tion, Lju Fengjing diris honteme kaj maltrankvile: "Kamaradoj, tio estas farenda por mi. Via laŭdo al nia grupo signifas por mi kritikon kaj edukon." La du ĈPLA-anoj ne komprenis ŝian parolon kaj demandis kion signifas ŝia respondo. Lju Fengjing eldiris tri mankojn en sia servado: 1. malmulta patrolado en la vagono; 2. maloftaj atentigoj al la pasaĝeroj; 3. malfrua anonco pri la atingota stacio, kaj pro tio pasaĝeroj ne povis pli frue fari preparon por descendo. Ŝi diris: "Se tiuj aferoj estas bone faritaj, tia perdiĝo ne povas okazi. Tio, ke la ĈPLA-ano forgesis sian surtuton en la trajno, montris la nesufiĉe bonan servadon de nia grupo kaj mankon en mia laboro." Aŭdinte la sinceran memkritikon de tiu juna kondukto, la du ĈPLA-anoj estis profunde kortuŝitaj kaj diris kun kontenta rideto: "Kamaradino kondukto, dankon! Via parolo ja estas por ni bona materialo de lernado, do ni jam plenumis nian taskon."

La revolucia spirito de malgranda Lju en severa traktado al la laboro gajnis respekton de ĉiuj grupanoj. De tiam la tuta kondukto grupo disvolvis tiun bonan laborstilon en sia laboro. Iun tagon de junio de la kuranta jaro, kiam la trajno trapasis la Vejŝuj-riveran ponton, jako de iu pasaĝero estis blovita eksteren. Poste, konduktoinoj Ĝaŭ Hiugen kaj Lang Fengming trovis la perditaĵon post klopodo. Kiam ili ricevis varman dankan leteron de la pasaĝero, la grupo ne kuŝis sur la laŭdo, sed faris seriozan diskutadon. En la kunveno, ili venis al klara kono: 1. el la laŭdoj kaj dankoj de la pasaĝeroj iujn ili devas rigardi kiel stimulojn kaj aliajn kiel kritikojn, oni ne devas esti fiera je aŭdo de laŭdo; 2. je ricevo de ĉiu laŭdo oni devas kontroli sian laboron por elimini



*En la kuirejo de la vagonaro*

mankon kaj el ĉiu eraro oni devas preni lecionon, kaj tio devas esti observata kiel regulo; 3. oni devas anticipe solvi problemon en ĝia ĝermiĝo. De tiam, ĉiufoje, antaŭ kiam la trajno trapasis la ponton, la konduktoinoj atentigis al la pasaĝeroj, ke ili fermu la fenestrojn por ke la rivera vento ne forblovu vestaĵojn eksteren. Krome, ili diligente faras patroladon kaj atentigojn kaj detale demandas al la pasaĝeroj pri iliaj cellokoj kaj kunportaĵoj, por ke ili ne forgesu iun ajn objekton.

## LAŬDO PRI KURAĜA KONFESO DE ERARO

La kondukto grupo ĉiutage devas akcepti ĉ. mil pasaĝerojn kaj trakti diversajn bagatelojn, kaj iam ricevis kritikon de pasaĝeroj pro ia eraro. Kiel ili sintenas en tia okazo?

Iufoje, antaŭ kiam la 214-a trajno deiris de Datong, iu ĈPLA-ano kondukis onklinon kaj du infanojn al konduktoino, dirante ke li ne povas akompani ilin en veturado pro okupateco kaj



*Interkonsiliĝo de konduktorinoj kun sia gvidanto pri laboro*

petis la konduktorinon helpi la maljunulinon ĉe la pekina stacio, por ke ŝi daŭrigu sian veturon al la Nordoriento de Ĉinio. La konduktorino Hing Ĉunĵuj diris al la ĈPLA-ano: "Ne maltrankviliĝu pri tio. Ni zorgos pri ili survoje ĝis Pekino kaj tie plenumos vian peton."

La konduktorino fervore zorgis pri la onklino kaj du infanoj. Kiam la trajno haltis ĉe Kangĝuang-stacio, la onklino volis promeni sur la perono kun infano kaj diris al Hing: "Mia filino, nepre atentigu min je la ekveturo!" Kun sitelo en unu mano kaj broso en la alia malgranda Hing promesis: "Estu trankvila, onklino. Mi certe atentigos vin!" Sed pro streĉa purigado de la vagono, ŝi forgesis la peton de la onklino. Kiam la trajno ekveturis, kun brula maltrankvilo la onklino rigardis sur la perono la forveturantan trajnon, kaj la alia infano en la vagono ploregis. Vidante tion, kun malkontento la pasaĝeroj kritikis la konduktorinon ke ŝi restigis la onklinon kaj infanon sur la perono pro sia neglektemo. Kion fari?

Ĉu Hing ekskuzu sin aŭ kuraĝe konfesu sian eraron, en tiu momento? La konduktorino de najbara vagono Dong Ĵujlian, kiu estas grupestro de la Komunista Junulara Ligo, diris al Hing: "La pasaĝeroj estas komprenemaj. Se nur vi konfesos la eraron, vi certe akiros iliajn pardonon kaj helpon." Reveninte al sia vagono, Malgranda Hing klarigis la kialon kaj sincere faris memkritikon pro sia neglektemo. Kaj la kondukta grupo tuj informis al Kangĝuang-stacio, ke ĝi veturigu la onklinon kaj infanon per alia ekspreso. Je tiu momento la vagono pleniĝis je ridoj kaj paroloj, la pasaĝeroj ne plu kritikis la konduktorinon, sed laŭdis ŝian kuraĝon en konfeso de la eraro. Du ĈPLA-anoj stariĝis kaj diris: "La malfacilaĵoj de la trajno estas ankaŭ niaj, la laboro de konduktoroj estas peniga. Por faciligi ilian laboron, ni decidis descendi ĉe la venonta stacio por veturi per la sama ekspreso kun la infano, por ke ĝi renkontiĝu kun la onklino." La helpemo de la ĈPLA-anoj donis al malgranda Hing profundan edukon. Kun varma larmo ŝi diris al la pasaĝeroj, ke ŝi certe pli bone servos al la pasaĝeroj.

## Novaj “Vendistoj”

**M**ATENO. Sur la bretoj kaj en la vitrinoj de magazeno de la urbo Hefej de Anhuj-provinco klientojn atendis diversaj varoj: freŝkoloraj silkaĵoj kaj kotonteksaĵoj, emajlaj kaj vitraj vazoj, plastaĵoj, diversaj fontoplumoj... Ĉe la vendostabloj streĉe laboris novaj “vendistoj”. Ili estis laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de fabrikoj venintaj por peti opiniojn de klientoj pri iliaj produktaĵoj. Aro da junulinoj venis al la vendostablo de silkaĵoj por elekti por si belajn silkaĵojn. Ge Dekun, teknikisto de la Anhuj-a Silkoteksejo, montris al ili la karakterizaĵojn kaj lavmetodon de la silkaĵoj, kaj dume petis iliajn opiniojn. La junulinoj ĉiuj aĉetis por si ŝatatan silkaĵon kaj ĝoje foriris.

Iom poste, el la homamaso, kelkaj klientoj en vestoj de montregionaj komunumanoj iris al Hju

Juĉun, varkontrolisto de la Hefej-a Plasta Fabriko, kaj liaj kamaradoj. “Ha! Hjuĉjo,” humore diris unu el la klientoj, “kiel granda estas via vendostablo! Ĝi etendiĝas de nia Ŝuĉa-komunumo eĉ ĝis ĉi tie?” Ili konas unu la alian jam delonge.

Por pliapaŝe altigi la kvaliton de siaj produktaĵoj, laboristoj de la plasta fabriko venis al kamparo en la lasta jaro, kunportante simplajn instrumentojn, por kolekti opiniojn pri iliaj produktaĵoj kaj senpage ripari plastajn sandalojn. Kiam ili venis al Ŝuĉeng-montregiono, ili trovis, ke la kalkanumoj de la montanoj estas rapide defrotitaj pro montogrimpado. Sed la fabriko jam ne plu produktis plastajn sandalojn kun iom alta kalkanumo pro tio, ke ili jam eksmodiĝis en la urbo. Por kontentigi la bezonon de la amasoj, la fabriko rekomencis pro-



*Laboristoj de la Anhuj-a Silkafa Fabriko aŭskultas opiniojn de klientoj en la vendejo.*



*La Emajlaĵa Fabriko de Hefej petas de magazenaj vendistoj opiniojn pri projektado.*

duktadon de tiaj sandaloj. Kaj la novaj produktaĵoj estis ĝustatempe liveritaj al la montanoj pere de la komerca fako. La kamparanoj de la montregiono estis tre kortuŝitaj pro tio. De tiam, laboristoj de la fabriko kaj komunumanoj de la regiono fariĝis amikoj.

Ĉe alia vendostablo, iu kliento diris: “Kamarado! Mi volas aĉeti 4 malgrandajn pilojn.” “Jes, jes.” respondis Hju Jaŭgin, maljuna laboristo de la Hefej-a Pilfabriko, kaj pensis, ke kun la disvolvigo de la industria kaj agrikultura produktado kaj altiĝo de la vivnivelo de la popolo, ĉiam pli kreskas la bezono de malgrandaj piloj por transistoro. Reveninte al la fabriko, li proponis al la fabriko, ke ĝi reformu ekipaĵojn kaj altigu produktivon por kontentigi la bezonon de la merkato. Lia opinio ricevis varman subtenon de la gvidantoj kaj laboristoj. Dank’ al komuna klopodo, la laboristoj du-obligis la produktivon.

Vaste kolektinte opiniojn de klientoj, la “vendistoj” revenis al siaj fabrikoj kaj klopodis kune kun siaj kamaradoj por multigi la specojn de produktaĵoj de malpeza industrio. En 1971, aldoniĝis pli ol 100 novaj specoj de produktaĵoj. Samtempe estis korektita la erara tendenco, ke iuj fabrikoj zorgas nur pri produkto de novaj varspecoj, sed neglektas produkti malnovajn.

Ĉe la vendostablo de ledaĵoj, la interparolo de

iu “vendisto” kun kliento altiris la atenton de multaj klientoj: “Kamarado, mi laboras ĉe la fervoja stacio de Hefej. Ĉar unu el miaj piedoj kripliĝis, tial unu el miaj ŝuoj ankoraŭ restas bona post dek jaroj dum la alia jam preskaŭ eluziĝis...” “O, do malŝparo, ĉu ne?” interrompis lin Vej Guogjun, vicestro de la laborejo de la Hefej-a Ledaĵfabriko. “Nu, ni faros tri ŝuojn taŭgajn por via sana piedo.”

Fakte, antaŭ tri jaroj, la fabriko jam komencis produkti diversajn ŝuojn bezonatajn de apartaj klientoj. Iun tagon antaŭ tri jaroj, iu juna laboristo de la agrikulturila fabriko de Fejhi-gubernio diris al vendisto, ke neniu el la laboraj ŝuoj de la fabriko taŭgas por liaj piedoj, kaj li volas havigi al si grandajn ŝuojn. La vendisto elektis por li kelkajn parojn da grandaj ledŝuoj, sed ankaŭ ili estis tro mallongaj. Post mezurado, la vendisto trovis, ke liaj piedoj longas pli ol la plej grandaj ŝuoj. Por fari paron da tiaj eksterordinaraj ŝuoj por li necesis pluraj tagoj. Maljunaj laboristoj diris: “Hodiaŭ, la Partio zorgas pri la laboristoj kaj speciale donas al ili laborajn ledŝuojn, do ni nepre devas fari tion por li.” De tiam, ĉiujare ili faris paron da ŝuoj eksterordinare grandaj por la laboristo.


Tiuj ekzemploj montris la noblan penson de la novaj “vendistoj” tutkore servi al la popolo kaj profunde kortuŝis la klientojn.



## Brodaĵoj de Suĝoŭ

La broda arto de Suĝoŭ kaj ĝia ĉirkaŭa regiono de Giangsu-provinco havas longan tradicion. La brodaĵoj konataj sub la nomo *suhju*, t.e. brodaĵoj de Suĝoŭ, estas unu el la famaj specoj de brodaĵoj de nia lando. La provincoj Giangsu kaj Ĝegiang tiel abunde produktas silkon, ke cirkulas jena popola diro pri ĝi: "Ĉiu el ĝiaj familioj bredas silkraŭpojn kaj faras brodadon". En la regiono de Suĝoŭ, brodado delonge estas amasa flankokupo. La brodaĵoj de tiu loko estas ornamadoj ĉefe por ĉambro kaj fame konataj pro siaj bela desegno, plaĉa koloro, varia kaj delikata brodado.

Post la Liberiĝo, la brodistoj suriris la vojon de kolektivigo. Dank' al la kolektiva saĝo, la laboristoj altigis sian nivelon de tekniko kaj plimultigis la variojn de la produktaĵoj. Ekzemple, la novaj verkoj "Kato", "Blanka Pavo" kaj aliaj estas elvolvitaj sur la bazo de la tradicia tekniko. La bildo de la verko "Monata Rozo" estas aranĝita laŭ ĉinstila pentraĵo, tamen en prezentado de la nuancoj, oni aplikis teknikon de olepentraĵo en brodarto, tiel ke la bildo havas novan guston de reliefeco.



Laboristo Vang Ginhi



Pando



Kato





Monata Rozo (ambaŭflanke simila brodaĵo)



# *Brile Radias*

## *Tradiciaj*

## *Metiartoj*

ĈEN HIN



Tibeta Bredistino (*Ligna skulptaĵo*)

### GLAZURAJ METIARTAĴOJ DE ZIBO

La glazuraj metiartaĵoj de Zibo, Ŝandong-provinco jam havas historion de pli ol 300 jaroj. Ili konsistas el interne pentrita flakono, interne pentrita kruĉo, botelo kun skulptita desegno, glazura floro en vitra globo, rozaria pordkurteno k.a.

Heredante kaj disvolvante la tradician karakterizaĵon de tiu metiarto, la laboristoj kuraĝe kreis multajn novajn produktaĵojn, tiel ke la nombro de specoj de glazuraj metiartaĵoj rapide kreskis de malpli ol 100 en la jaroj tuj post la Liberiĝo ĝis pli ol 1,500. Kaj ĝia nivelo en desegnado, projektado kaj figurado leviĝis multe. Oni trovis antaŭe malfacilecon por pentri kelkdek homfigurojn sur interna surfaco de malgranda flakono tra aperturo kun gran-

deco de sojo-grajno, kaj nun oni jam povas pentri en ĝi pli ol 400 homfigurojn, kiuj estas artisme faritaj tute vivaj laŭ tradicia stilo de la ĉina pentraĵo, en delikataj klaraj strekoj. Por speguli niajn grandajn sukcesojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj la batalan vivon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la metiistoj ankaŭ zorgeme komponadis sinsekve novajn pentraĵojn “Leviĝanta Suno super Petrolkampo”, “Milicanoj de Suda Maro”, “Riĉa Rikolto” k.a., kiuj elspiras altan vivardecon.

Dum la lastaj jaroj, ili pluapase disvolvis la produktadon de tradiciaj florgloboj kaj rozariaj pordkurtenoj, kaj samtempe ankaŭ ensorbis alilokan sperton por produkti glazurajn pentraĵojn “Jan-an” kaj aliajn en formo de murornama pendaĵo.

## BAMBU-PLEKTAĴO KUN PORCELANA INTERNO DE SIĈUAN

Porcelanaĵo strikte tegita per bambuplektaĵo estas tradicia metiartaĵo unike produktata en Siĉuan. Ĝi estas fama en- kaj ekster-lande pro sia aparta gusto kaj rafinita metiarto. La plektaĵo teganta fajn- porcelanaĵon kun diversaj belaj desegnoj estas farita el tre maldikaj bambuaj strietoj horizontale kaj bambuaj filamentoj vertikale. Ĉijare, la laboristoj de la dependa fabriko de la Ĉengdu-a Metiarta Instituto faris provadon sur la bazo de tradicia plektarto por plekti novajn kolorajn desegnojn de pejzaĝo, floro, birdo, besto kaj fiŝo. Post diligenta penado, ili plektis kelkdek novajn desegnojn kiel “Pandoj”, “Tropikaj Fiŝoj”, “Papilioj”, “Cignoj”, “Pigoj sur Umearbo” k.a.

Bambu-plektaĵo kun porcelana interno havas longan historion kaj estas unu el la valoraj heredaĵoj de niaj popolaj metiartaĵoj. Post la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĝiaj produktaĵoj plimultiĝis en nombro kaj pliboniĝis en kvalito.

## BIRDOPLUMA BILDO DE ŜENJANG

Enirante en la ekspoziciejon de la Birdopluma Metiarta Fabriko de Ŝenjang, oni kvazaŭ venas al ĝardeno kie pompas diverskoloraj floroj kaj verdas belaj arboj. Ĉiuj versimilaj bildoj de floroj, birdoj, bestoj, pejzaĝoj kaj homfiguroj estas faritaj el diverskoloraj birdoplumoj. La plej alloga estas la granda bildo de pejzaĝo en kiu la verda monto estas formita el kungluitaj plumoj de aglo kaj alciono, la fortika verda pino el plumoj de monta fazano kaj pavo, kaj la ondantaj neĝkovritaj montoj kaj nubaro en malproksimo el plumoj de cigno. Dank’ al lerteco kaj sagaco de la metiartistoj, formiĝis la pentraĵo montranta la majestan pejzaĝon de nia norda lando per tiuj plumoj.

Kuraĝigitaj de la principo elmetita de Prezidanto Maŭ “**Floru cent floroj, elvolviĝu novo el malnovo**”, la veteranaj metiartistoj kaj belartistoj la unuaj kreis tiun duonreliefan birdopluman bildon en la jaro 1961, kunigante la teknikon de tradicia metiarto kun la aparta supereco de la tradicia pentrarto kaj novjara pentraĵo de Ĉinio kaj de reliefo kaj olepentraĵo el Okcidento, utiligante la tre variajn naturajn kolorojn de malsamaj birdoplumoj. Nun, ankaŭ Ŝandong, Guanghi kaj aliaj lokoj produktas tiajn belajn vivplenajn birdoplumajn bildojn.

## MIRINDA POKALO

*Jeguangbej* aŭ “nokte brilanta pokalo” estas farita el jado produktata nur en Giukjuan, Gansu-

provinco. Tiu metiartaĵo havas tre longan historion en nia lando. La jado havas variajn kolor-tonojn kaj la pokalo estas zorgeme skulptita en bela formo. Tia vina pokalo aparte bele brilas sub la lumo de luno aŭ lampo.

Kvankam ĝi ĝuis jam de longe renomon en- kaj ekster-lande, tamen en la malnova socio, la diversaj entreprenoj sin trovas en depresio kaj la popolanoj apenaŭ povis vivteni sin, multaj jaduskulptaj laboristoj sub minaco de malsato devis ŝanĝi sian profesion. En la antaŭvespero de la Liberiĝo, restis nur tri laboristoj de tiu metio en la tuta regiono de Giukjuan, tiel ke tiu metiarto alfrontis plenan pereon. Post la Liberiĝo, sub la zorgo kaj subteno de la Partio kaj registaro, la produktado de *jeguangbej* iom-post-iom revigliĝas. Nun, en Giukjuan-gubernio funkcias speciala fabriko kun pli ol 70 metiartistoj por skulpti diversajn *jeguangbej*.

Dum la lastaj jaroj, la metiartistoj diligente klopodis kaj sukcesis produkti novformajn metiartaĵojn kiel diversaj taso, pokaloj, bovloj kun kovrilo kaj bovlegoj. Post senĉesa plibonigo de la metiarto, la rebrileco multe kreskis, tiel ke la *jeguangbej*-metiarto heredita de antikveco elsendas novajn brilojn.

## KRIZANTEM-ŜTONA SKULPTAĴO DE HUNAN

Sur la fundo de Liujang-rivero de Hunan-provinco troviĝas malhelkoloraj ŝtonoj, sur kiuj estas nature multaj blankoj. Tieaj metiartistoj utiligas tiujn ŝtonojn por fari diversajn delikatajn belajn skulptaĵojn laŭ la natura dislokiĝo de la blankoj sur la ŝtonoj. La blankojn metiartistoj skulptis en krizantemajn florojn, kaj pro tio la metiartaĵo ricevis la nomon de krizantem-ŝtona skulptaĵo. La skulptistoj devas havi grandan sagacon en komponado de sia verko, por ke ĝi aspektu bela kaj natura. La materialo estas simpla sed la skulptaĵo estas tre rafinita, kiu spegulas la saĝecon de niaj laborantaj popolanoj.

Daj Kingŝeng, kiu estas veterana skulptisto de krizantem-ŝtono kun aĝo de 83 jaroj, komencis lerni la metion en Liujang jam de sia 13-jara aĝo, kaj havas riĉan sperton pri tiu arto. Sed, sub sufoka premado de la kuomintanga registaro, la skulpta metio de krizantem-ŝtonoj troviĝis en senlira stato, tiel ke li fine vole nevole devis ŝanĝi sian profesion. Post la Liberiĝo, tiu ĉi veterana metiartisto instruas la metion en Ĉangŝa, kaj sub lia gvido la laboristoj daŭre strebas al pli alta nivelo en projektado kaj figurado, kaj kreis multajn krizantem-ŝtonajn skulptaĵojn kun artvaloro relative alta.



Bambuo kaj Krizantemoj (*Krizantem-ŝtona skulptaĵo*)



Ĉang-e Flugas al la Luno (*Ebura skulptaĵo*)



Leono (*Bird-pluma bildo*)

# Penlaboro Estas Gloro

**Ĝ**ENG Gjunĝaj, kiu funkcias kiel vicsekretario de la partia komitato kaj vicedestro de la revolucia komitato de la 6412-a Fabriko, estas veterana kompartiano. Dum la milita periodo, li pene batalis kaj faris kontribuojn por la popolo, kaj dum la socialismaj revolucio kaj konstruado, li ĉiam estas modesta kaj singardema kaj faris novajn kontribuojn por la revolucio kun la spirito de penema luktado en malfaciloj.

Kvankam li laboris en urbo pli ol 20 jarojn kaj ŝanĝiĝis lia medio kaj pozicio, tamen li ĉiam tenas sian revolucionan spiriton.

Antaŭe la fabriko kie laboras kamarado Ĝeng Gjunĝaj estis riparejo de iu trupo, kaj ĝi disvolviĝis en relative grandan fabrikon jam antaŭ kelkaj jaroj. Tamen, maljuna Ĝeng laboris ankoraŭ en la ĉambro apud iu laborejo. Poste, la fabriko konstruis domegon por administrado kaj aranĝis en ĝi novan laborĉambron por li. Iutage, administranto diris al li: “Jam grandiĝis nia fabriko kaj multiĝis niaj kontaktoj kun aliaj. La mebloj de via ĉambro estas tro simplaj kaj mi volas aĉeti por vi kelkajn sofojn, ĉu bone?” Maljuna Ĝeng sentis tiun ideon erara kaj paciencie admonis la administranton konservi la spiriton de penema luktado en malfaciloj. Li diris: “Dum la milita periodo, kun tornistro sur la dorso ni ĉiam laboris prenante la genuojn kiel tablon. Nun sub bonaj kondiĉoj ni jam havas skribotablojn kaj seĝojn, kvankam simplajn tamen uzeblajn. Ni ne devas ĉasi luksecon.” La administranto estis deadmonita, kaj la ĉambro de maljuna Ĝeng estas simple meblita kiel antaŭe.

Konsiderante pri la granda aĝo de maljuna Ĝeng, la malproksimeco de lia loĝejo kaj bezono de laboro, la superuloj asignis aŭtomobilon por lia dispono. Sed li neniel volis akcepti ĝin. Poste oni donis al li anstataŭe ĵipon, kaj li ankoraŭ ne volis veturi per ĝi krom por iri al kunveno en supera instanco kaj laboroj en aliaj lokoj. Iutage, neĝegis. Post kunveno en supera instanco, li tuj raportis ĝian enhavon al la membroj de la partia komitato, kaj post tio jam estis la 23-a horo. La ŝoforo aten-

dis lin ĉe la domego. Li rigardis sian brakhorloĝon kaj rimarkis ke ĝuste estas la horo de finiĝo de la deĵoro de la dua skipo. Li diris al la ŝoforo: “Tiom granda estas la neĝo, ĉu oni jam sendis ĉarojn al ili?” En tiu momento, kvar laboristinoj preterpasis tie kun siaj infanoj, kaj li puŝis ilin unu post alia en la ĵipon. La lastaj diris: “Vi estas kadro gvidanta kaj pli aĝa ol ni, do vi devas veturi per ĝi.” Tamen li urĝis la ŝoforon tuj starti por ke la infanoj ne malvarmumiĝu. La ŝoforo kaj laboristinoj diris kortuŝite: “Maljuna Ĝeng zorgas nur pri amasoj, sed ne pri si mem.”

Kamarado Ĝeng Gjunĝaj severe traktas sin mem kaj serioze efektivas la politikon de la Partio neniam lasante al si mem ĝui privilegion. Li ofte diras: “Mi estas ordinara kompartiano, mia rajto estas donita de la popolo, kaj mi neniam devas ĝui privilegion profitante mian ofican rajton.”

En printempo de 1966, la supera gvidantaro sciigis al maljuna Ĝeng ke unu el la laborejoj de lia fabriko estos translokigita al interna loko por subteni tiean konstruadon. Konsiderinte ke lia edzino suferas de kronika malsano kaj lia tria filino Ajhua estas tre juna, la superulo intencis transpostenigi lian duan filinon Ajjong, kiu estas elektrolaboristino en tiu laborejo, al alia laborejo, por ke ŝi restu en Ŝenjang kaj zorgu pri siaj gepatroj. Maljuna Ĝeng diris: “Mi dankas al la gvidantaro, tamen mi ne povas plenumi tiun decidon. Kiel mi povus eduki aliajn se mi mem ĝuus privilegion?” Post nelonge, Ajjong ĝoje foriris kune kun aliaj kamaradoj de la laborejo. En la jaro 1969, lia edzino forpasis. Foje, gvidantaj kamaradoj venis al la fabriko por inspektado kaj rimarkis ke Ĝeng malgrasiĝis. La kaŭzo estis tio, ke ĉiutage li laboris ĝis tre malfrua horo kaj troviĝis neniu en la hejmo por zorgi pri lia vivo. Ili do decidis revenigi Ajjong al Ŝenjang. Timante ke li malkonsentos, la aranĝanta kamarado de tio ne diris tion al li. Tamen, kiam li faris la finan procezon, Ĝeng sciigis pri tio. Li kritikis la kamaradon ke li ne persistas en principoj. La lasta diris: “Tio estas decidita de superaj kamaradoj, kaj cetere vere estas malfaciloj en via hejmo!”

Tiam li diris serioze: “La hejmoj de la plejmulto de la transpostenigitaj kamaradoj restas en Ŝenjang, kaj ankaŭ ili havas tiajn aŭ aliajn malfacilojn, ĉu ankaŭ ili povas reveni? Mi ne devas ĝui privilegion.” Li ne nur ne konsentis tion sed male skribis al lia filino por ke ŝi diligente laboru sur sia posteno kaj tutkore servu al la popolo.

**“La problemo eduki daŭrigantojn de la afero de proleta revolucio . . . estas problemo treege grava, de vivo kaj morto por nia partio kaj nia ŝtato.”** Tenante en sia koro tiun instruon de Prezidanto Maŭ, maljuna Ĝeng ofte profundiĝas en la amasojn kaj edukas la junan generacion per la revolucia spirito de penema luktado en malfaciloj.

Iu juna teknikisto ĵus diplomiĝinta el lernejo emas frandi kaj elegante sin vesti, influite de burĝa penso. Kamarado Ĝeng Gjunĝaj ofte faris kun li korverŝan interparolon kaj edukis lin per la spirito de penema luktado en malfaciloj. Vidante ke kvankam la partiana aĝo de la maljuna kadro estas pli granda ol lia vivaĝo, lia kontribuo pli multa kaj lia enspezo pli alta tamen li ankoraŭ vivas simple kaj modeste, la junulo tre hontis. De tiam li prenis maljunan Ĝeng kiel ekzemplon, vivas simplan vivon kaj serioze remuldas sian mondkoncepton. Kaj li fariĝis poste grava teknikisto de la laborejo.

Antaŭ la pasinta jaro, grupo da intelektaj junuloj venis al la fabriko kiel metilernantoj. Rigardante tiujn vivecplenajn junulojn, li sentis ĝojon kaj pensis ke tiuj urbaj intelektaj junuloj neniam sin hardis en malfacilaj cirkonstancoj, kaj estas grave ke ili bone

faru sian unuan paŝon en la fabriko. Li do persone gvidis ilin partopreni en rekonstruo de laborejoj en vintro. Li kune kun ili lernis, laboris kaj edukis ilin per la spirito de penema luktado en malfaciloj agante kiel ilia modelo. Iutage, kiam li venis al la laborejo, li rimarkis ke iuj junuloj montras ŝanceliĝemon en la laboro, rigardante sangajn vezikojn sur siaj manoj kaj la konstruon ĵus komencitan kaj palpante siajn ŝvelintajn ŝultrojn. Dum ripozo, li rakontis al la junuloj kiel la ĈPLA-anoj brave batalis siatempe. Li diris: “Estis batalo en Ĉangvej de Ŝandong-provinco, 1948. Mia kompanio prenis por si la taskon de barado kaj sinsekve venkis en dekoj da atakoj. La kompaniestro serioze vundiĝis tamen ankoraŭ persiste restis sur la fronto. Antaŭ sia morto, li diris: “Kamarado direktanto, diru al aliaj kamaradoj, ke ili ne forgesu la mizerulojn en la mondo kaj ĉiam sekvu la Kompartion kaj Prezidanton Maŭ en revoluciado ĝis la fino!” Post momenta silento, maljuna Ĝeng kore diris al la junuloj: “La revoluciaj martiroj sinforĝese batalis la tutan vivon kaj ili pensis pri la mizeruloj tra la mondo eĉ en agonio. Tio ja estas la ĝisfunda revolucia spirito de la proletaro por liberigi la homaron! Por revoluciado, ni bezonas ĝuste tian spiriton!” Tio forte kortuŝis la junulojn. Ili ĉiuj esprimis sian firman decidon heredi la revolucionan tradicion de peniga luktado kaj ĵuris daŭrigi la proletaran revolucionan aferon! Post edukado kaj labora hardado, tiuj junuloj altigis sian ideologian konscion kaj petis permeson transiri al peniga laborposteno.



*Ĝeng Gjunĝaj rakontas al la junulinoj pri la glora tradicio de penlaboro.*



# Aktivado de Geknaboj ekster la Lernejo

**E**NPASINTE Ŝoŭpo-strateton en Ĉongven-kvartalo de Pekino, oni ofte aŭdas voĉlegadon de geknaboj en iuj kortoj. Tio estas aktivado de eksterlernejaj grupoj de la Ŝoŭpo-strateta Elementa Lernejo. La pli ol 800 geknaboj de la lernejo estas organizitaj en 220 grupoj por eksterlerneja aktivado laŭ klaso.

En iu korto, kelkaj geknaboj sidas en rondo. Iuj el ili voĉlegas tekston de ĉinlingva leciono, aliaj parkere memoras novajn vortojn de fremda lingvo kaj triaj faras aritmetikajn ekzercojn. Dum ripoza horo, ili aŭ kantas, rakontas, legas bildrakontojn, aŭ sin amuzas per ludoj inkluzive de tabloteniso kun kadro desegnita per kreto sur cementa planko kiel ludotablo. Instruistoj de tempo al tempo venis por vidi kaj helpi ilin.

Ĉiu grupo havas sian estron kaj eksterlernejan guvernanton, kiu konstante zorgas pri ilia disciplino kaj ideologia edukado.

Ĉiuj guvernantoj estas emeritaj laboristoj kaj onklistoj elektitaj de amasoj, kiuj varme amas amasan laboron kaj havas bonajn pensojn. Kvankam ili neniam akceptas materian rekompencan en la laboro, sed ili sentas sin gloraj pro tio, ke ili faras kontribuon por sana kreskado de la infanoj. Ili bone helpis la lernejon kaj familion en edukado per sia laboro kaj ricevis ilian laŭdon.

Tiaj grupoj fondiĝis en 1968. Antaŭe lernantoj vagis sur stratoj post la lernohoro. Tio ne

nur malhelpis la lernantojn progresi en lernado, sed ankaŭ povis havigi al ili nebonajn kutimojn. Ekzemple, iuj el ili ŝatis ludi katapulton kaj ofte rompis vitron de fenestro; kaj aliaj ŝatis grimpi arbojn, kio malhelpis al ilia kreskado.

En 1968, la lernejo invitis reprezentantojn de kadroj de stratoj partopreni en gvida laboro de la lernejo. Ili diskutis pri la graveco de eksterlerneja edukado de lernantoj. De tiam eksterlernejaj grupoj disvolviĝis en la ĉirkaŭaĵo de la lernejo.

La maljunaj guvernantoj tre alte taksas la gvidan laboron de la grupoj. Fariĝinte guvernanto onklisto Vang Gincun aktive purigis ĉambron kaj preparis tablojn kaj seĝojn por la geknaboj. En la unua tago de aktivado de la lernogrupoj, ŝi donis al la geknaboj vivecan lecionon de klasbatalo. Ŝi diris: "Kiam mi estis 5-jara, mia patro mortis. Post tiam mia patrino kaj mi kun miaj gefratoj devis satigi nin per sovaĝaj legomoj kaj brano. Kiam mi estis sesjara, oni konsilis al mia patrino ke ŝi forvenu min, sed ŝi ne konsentis. Nun, 7-8-jaraj geknaboj, kiel vi, jam povas viziti lernejon kun librosako. Sed, en tiu aĝo mi eĉ ne kuraĝis revii pri lernado..." Ŝia komparo profunde edukis la geknabojn.

Ĉar la guvernantoj kaj lernantoj ĉiuj loĝas en stratoj ĉirkaŭ la lernejo, la guvernantoj povas ĉiuflanke zorgi pri la geknaboj.

Ili konstante konservas rilaton kun la instruistoj kaj gepatroj de lernantoj, tiel ke la lernejo, socio kaj familio formas unu tuton de edukado, por ke la geknaboj ĉiam kaj ĉie ricevu necesan helpon.

Iu knabo, kies gepatroj laboras en oficejo, ne volis partopreni en tia grupo kaj ofte forestis de la lernejo sen permeso. Liaj gepatroj edukis lin ĉiamaniere, sed malmulte sukcesis. Sciinte tion, onklisto Liu Venĉen interkonsiliĝis kun liaj gepatroj kaj decidis, ke la knabo loĝu ĉe ŝi, kaj ŝi akompanis la knabon iri al kaj reveni de la lernejo. Ŝi edukis la knabon je diversaj okazoj. En la pasintaj pli ol unu jaroj, la knabo jam multe progresis.

Lernantoj de la lernejo serioze lernas, helpas unu alian kaj progresas senĉese sub la komuna zorgo de la lernejo, familio kaj socio. Ili amas laboron kaj zorgas la kolektivon: Ili plantis kaj flegis arbojn kaj balais neĝon sur stratoj; vektoportis akvon, purigis korton kaj aĉetis objektojn por familioj de armeanoj kaj martiroj. Ili kutime estas diligentaj kaj ŝparemaj. Ili faris novajn kretojn el kretaj finaĵoj. Plimultiĝis kazoj ke lernantoj trovis objektojn kaj donis ilin al la perdintoj. En la lastaj jaroj, la lernejo kaj strataj komitatoj ricevis valorajn objektojn trovitajn de lernantoj kiel oran brakhorloĝon, monujon, vestaĵon, kaj bagatelaĵojn kiel butonon kaj moneron de unu cendo. La infanoj ricevis pro tio multajn laŭdojn de amasoj.



# Transportado de Lignoj sur Dadu-rivero

**S**IMILE al furioza sovaĝa ĉevalo, la ondeganta Dadu-rivero muĝas en la alta montaro de la okcidenta parto de Siĉuan-provinco. En la jaro 1935, la Ruĝa Armeo havis streĉan batalon kun la malamiko por transpasi tiun ĉi naturan barieron en sia Longa Marŝo al la Nordo por rezisti kontraŭ la japanaj invadantoj. Kaj pro tio, Dadu-rivero famiĝis tra la tuta lando.

La bordoj de la supra parto de la rivero estas plene kovritaj de primitivaj arbaroj, kiuj formis riĉan fonton de ligno. Sed tie la montoj estas tre krutaj kaj malfacile trafikeblaj por fari arbohakadon kaj transporti lignojn. Kun la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado, pli kaj pli grandiĝis la bezono de lignoj. Nova tasko de kiel eble plej rapida ordigo de Dadu-rivero estas elmetita al la departemento de surakva transportado por flose transporti lignojn sur la rivero.

En la somero de 1956, du ĉefaj gvidantoj de la departemento por surakva transportado sur Dadu-rivero faris esploradon al la rivero kun laboristoj kaj teknikistoj sub sia gvido. Ili piediris pli ol 600 kilometrojn, transgrimpante montojn kaj danĝerajn rokmurojn, faris detalan esploron pri ĉiu grava danĝera malprofunda fluejo kaj fine venis al la konkludo, ke kvankam estas multaj malfaciloj en ordigo de Dadu-rivero, tamen estas tute eble ŝanĝi ĝin en vojon por transporti lignojn.



En la kvara trimestro de tiu jaro, komenciĝis la ordigado de Dadu-rivero. Armeo de laboristoj marŝis al la konstruejoj. Inter la gvidantoj de la laboro, sin trovis batalanto de la Ruĝa Armeo, kiu partoprenis en la tiea batalo dum la Longa Marŝo sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Tage li streĉe laboris kune kun la laboristoj, kaj nokte li ripozis kune kun ili en monta kaverno. Kiam ili renkontis malfacilon, li kuraĝigis la kamaradojn

# Tra la Socialisma Ĉinio

## KONTINUA KAJ STABILA PLIPRODUKTO DE NIA PETROLO

Post kiam nia lando efektivigis fundamentan memprovizon de petrolo en 1963, la produktokvanto de nafto pligrandiĝis meznombre je 24.5% en ĉiu jaro. De januaro ĝis aŭgusto ĉijare, la produktokvanto de nafto pliiĝis je 22.8% ol tiu de la sama periodo en la pasinta jaro kaj tiu de natura gaso pliiĝis je 15.5%. En la unuaj 8 monatoj de la kuranta jaro oni plenumis 70% de la jara plano de enbora longeco, kaj la enbora kvalito plialtiĝis ol tiu en la pasinta jaro. Nun iuj olekampoj plie vastigis sian ekspluatatan areon kaj granda nombro da novaj oleputoj komencis produktadon, kio garantias kontinuan kaj stabilan plimultiĝon de la produktokvanto de nafto.

En la kuranta jaro, por serĉi novajn petrolfontojn kaj ekspluati novajn olekampojn, dekmiloj da prospektoroj de nia lando faris kampanjojn de

prospektorado de petrolo en iuj lokoj. Ankaŭ en aliaj lokoj oni trovis oleentajn kaj gasoentajn strukturojn unu post alia kaj kreis nombron da altproduktaj oleputoj kaj gasoputoj. Granda kvanto da geologiaj materialoj montris, ke en nia lando sin trovas multaj sedimentaj basenoj kun dikaj tavoloj de sedimenta roko, kie sin kaŝas abundaj petrolo kaj natura gaso, kio formis bonan kondiĉon por disvolvo de nia petrola industrio.

## FINIĜIS LA KONTRAŬINUNDA KONSTRUO EN SUDORIENTA ANTAŬURBO DE PEKINO

La nomita konstruado komenciĝis en aŭtuno de 1970. Ĝi celis reordigi la riverojn Venju, Fenghe kaj Ganggoŭ en la supra baseno de Hajherivero. Ĝia laboro konsistis el dragado kaj senkurbigado de rivervojoj, plivastigo kaj profundigo de riverlitoj, konstruado de digoj kaj kluzoj k.a. La

per rakonto pri heroaĵoj de la Ruĝa Armeo en tiutempa batalado ĉe tiu rivero. La laboristoj elmetis al si la bravan devizon "antaŭenmarŝu laŭ la spuro de la Ruĝa Armeo" kaj firme decidis venki ĉiajn malfacilojn por plenumi la taskon.

La plej grava kaj malfacila laboro estas forigi rifojn en la fluo por glatigi la fluejon. 70 procentoj de Dadu-rivero fluas en ravino, en kelkaj lokoj la torento similas al akvofalo. En la rivermezo staris multaj rifo, ĉirkaŭ kiuj plaŭdis ondoj ŝaŭmantaj. Estis tute neeble proksimiĝi al ili tra la akvo. Pro la mallarĝeco de la fluo, navigaj laboristoj instalas kablojn super la rivero pendantajn de ambaŭ bordoj. Sur tiuj kabloj, laboristoj sin movis al la rifo, borus mintruojn en ilin kaj foreksplodigis ilin per dinamito.

Tio estis danĝera laboro. Laboristoj konkurencis sin anoncis kiel partoprenantoj. Dum forigo de la rifo ĉe Mosuotankoŭ, la t.n. gorga sekcio, kompartianoj-eksarmeanoj Hu Ĝigjun kaj Li Kajming brave sin ĵetis en la batalon antaŭ la aliaj. Sidante sur

tabulo pendanta de la kablo, ili glitis de rokmuro alta je kelkdek metroj al la rifo en la rivermezo kaj borus en ĝin mintruojn. Dum sia energia laborado, subite la kablo rompiĝis pro fortostreĉo, Hu Ĝigjun kaj Li Kajming falis en la akvon kaj tuj estis puŝitaj de ondegoj en akvoturniĝon. Firme tenante la kablaron en siaj manoj, ili luktis kun la ondegoj per ĉiuj siaj fortoj. Dank' al klopodado de la laboristoj, ili estis savitaj. Post ioma ripozo, ili denove prenis instrumentojn, sin puŝis al la rivermezo kaj fine eksplodigis la ŝtonon.

En la pasintaj pli ol dek jaroj, senĉese bruis la eksplodantaj minoj kaj pli ol 450,000 kubmetroj da rifo estis forigitaj.

Post unu jaro de malfacila ordigado, unuafoje en la historio granda kvanto da lignoj estis flose transportita per Dadu-rivero al aliaj lokoj en la inunda sezono de 1957.

Tamen por fari la riveron facile trafikebla, oni devis forigi ankoraŭ multajn barojn en kaj ambaŭ-

vastaj amasoj de popolanoj, kadroj kaj inĝenieraj teknikistoj en antaŭurbo de Pekino jam plenumis tiun konstruon post penado de la du vintroj kaj printempoj. Ili fosis kaj plivastigis fluejojn kun longeco de 78 kilometroj, konstruis ambaŭborde de la riveroj kontraŭinundajn digojn kun longeco de pli ol 125 kilometroj kaj pli ol 200 diversajn konstruaĵojn, kiaj estis pontoj, kluzoj kaj kulvertoj.

La finplenumo de tiu konstruo sekurigas kvaronon de la agroj en la antaŭurbo de Pekino kontraŭ inundo kaj kreis favorajn kondiĉojn por disvolvo de agrikultura produkto. En la pasinteco, la regiono de la nomitaj riveroj estis ofte inundita dum pluvego pro malalteco de la tereno. En la lasta somero, tie falis malofta pluvego. En la regiono de la supra baseno de Venju-rivero, la pluvokvanto en pli ol unu tago atingis 300-500 milimetrojn kaj la flukvanto de la rivero atingis 600 kubmetrojn po minuto. Dank' al tiu konstruo la akvego estis rapide fordrenita.

## BIOLOGIAJ PRODUKTAĴOJ DE NIA LANDO

Post la Liberiĝo, nia lando multe faris biologiajn produktaĵojn por preventi, kuraci kaj diagnozi diversajn infektajn malsanojn.

Antaŭ la Liberiĝo, sub la malluma regado de la kuomintanga reakciularo la vasta laboranta

popolo de nia lando estis ne nur ekspluatata kaj subpremata, sed ankaŭ minacata de epidemioj. Tiam en nia lando estis nur unu instituto de biologiaj produktaĵoj. Ĉar la specoj de biologiaj produktaĵoj estis malmultaj, ilia kvalito malalta kaj ilia produktokvanto malgranda, oni tute ne povis per ili regi kaj ekstermi infektajn malsanojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Partio kaj registaro tre zorgas la sanon de la laboranta popolo kaj starigis biologiajn institutojn en ĉiuj grandaj regionoj. Ĝis 1956, la nombro de laborantoj de biologiaj produktaĵoj de la tuta lando superis 14-oblon de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĉiuj provincoj ĝenerale fondis aŭ sin preparis por fondi fabrikojn kaj institutojn de biologiaj produktaĵoj, por pli bone disvolvi preventadon de malsanoj. En la lastaj jaroj, multaj biologiaj produktaĵoj por preventi oftajn kaj ripetemajn malsanojn estis sukcese provfaritaj unu post alia. Nun la biologiaj produktaĵoj oficiale farataj de ĉiuj biologiaj institutoj de nia lando jam superis cent specojn. La produktokvanto de vakcinoj de morbililo, B-tipa encefalito, leptospirilozo kaj brucelozo 2.5-oble plimultiĝis en la lastaj jaroj kaj ilia kvalito stabile leviĝis. La produktaĵoj ne nur fundamente kontentigis la bezonon de nia lando, sed ankŭ estas liveritaj al aliaj landoj.

flanke de la rivero. En akvo-malabunda sezono la navigaj laboristoj ordigas la fluejon kaj en akvo-abunda sezono sin okupas ĉefe per reflosigo de lignoj haltigitaj ĉe malprofundejo aŭ de rifo en la rivero. Se lignoj amasiĝas pro baro de rifo aŭ pro obstrukcio, oni devas tuj disigi ilin, alie lignoj amasiĝas pli kaj pli multe kaj povas obstrukci la fluejon. Kaj disigo de tia lignamaso estas danĝera laboro. La lignaj amasoj en variaj formoj iufoje estas malfacile disigeblaj kaj alfoje abrupte disfalas pro ektuŝo kaj tia subita disfalo povas kaŭzi morton, se la laborantoj ne estas sufiĉe singardemaj.

Iutage, ĉe la malprofundejo Kingŝijan aperis danĝera ligna amaso, kiu baldaŭ fariĝis altaĵo kiel duetaĝa domo kun miloj da lignoj. Informiĝinte pri tio, sperta maljuna laboristo Ĝang Sijong rapidis al la loko kun sturma grupo sub sia gvido. En kaŭĉuka boato ili flosis en la direkto de la fluo oblikve al la amaso. Kiam la boato proksimiĝis al la amaso, Ĝang Sijong lerte kroĉis lignopecon per sia disigilo kaj saltis sur la amason. Poste, li altiris la ba-

lanciĝantan kaŭĉukan boaton sur la ondoj, por ke la aliaj kamaradoj suriru la lignan amason. Poste, li esploris la strukturon de la ligna amaso kaj komencis labori. Dank' al ilia movo, la amasego tuj disfalis kaj la lignoj denove komencis flosi antaŭen en la ondanta torento.

Senĉese disvolviĝas la ordigado de Dadu-rivero. La flosigado, konservado kaj transportado de lignoj nun progresas sur la vojo de mekanikigo kaj aŭtomatigo.

Por faciligi la transportadon, nun pli ol 240 relative grandaj flosigaj konstruaĵoj estas starigitaj laŭ la rivero, konstruiĝis aŭtovojo kun longeco de pli ol 740 kilometroj kaj 53 pontoj. Multaj pezaj laboroj estas nun farataj de maŝinoj anstataŭ homoj. Dank' al apliko de ĉiam pli multaj maŝinoj, senĉese kreskas ankaŭ la kvanto de la flosigitaj lignoj. De la jaro 1957 ĝis nun, jam pli ol 14,700,000 kubmetroj da lignoj estas transportitaj tra la rivero por kontentigi la bezonon en Siĉuan kaj aliaj provincoj.

## *Tra la Mondo*



*Ĉinaj kaj albanaj kuracistoj akupunkturas surdmutajn lernantojn.*

*Post kuracado lernantoj de la Blindula, Surdula kaj Mutula Lernejo de Tirano jam povas aŭskulti aŭ paroli. Jen ili aŭskultas disaŭdigon.*



## **RAPIDE DISVOLVIĜAS LA KURACA KAJ HIGIENA AFERO EN ALBANIO**

Dank' al la rapida disvolviĝo de la kuraca kaj higiena afero, la sanstato de la albanaj vastaj popolamasoj ĝenerale pliboniĝas.

Dum la lastaj jaroj la albana registaro donis grandan atenton al kulturado de medicinaj laborantoj kaj pro tio la nombro de kuracaj laborantoj kaj medicinaj ekipaĵoj multiĝis jaron post jaro. En 1960 troviĝis en la tuta Albanio nur 131 hospitaloj kaj 8,200 litoj por malsanuloj, sed en 1971 estis jam 415 hospitaloj kaj 15,600 tiaj litoj.

Ankaŭ la produkto de medikamentoj en Albanio ricevis senĉesan progreson. Multaj medikamentoj, kiuj antaŭe ne povis esti produktitaj, nun estas produktataj kaj sufiĉe kontentigas la bezonon de la lando. Laŭ statistiko, nur en la lastaj kvin jaroj la medikamentaj farejoj jam produktis pli ol 80 specojn de novaj medikamentoj.

## **KOREIO KONDAMNIS LA USONAN IMPERIISMON PRO ĜIA MALHELPO DE DISKUTADO PRI LA KOREA PROBLEMO EN UN**

En la 27-a de septembro, 1972, la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio publikigis deklaron forte kondamnantan la usonan imperiismon pro ĝia malhelpo de diskutado pri la korea problemo en la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

La deklaro diris: "La registaroj kaj popoloj de multaj landoj sincere esperas plej rapidan efektivigon de la nacia reunuiĝo de nia popolo, varme bonvenigas la publikigon de la norda-suda komuna deklaro de Koreio bazita sur la tri princi-

poj de sendependa kaj paca reunuiĝo kaj granda nacia unueco kaj la fortan disvolviĝon de la batalo de la korea popolo por la sendependa kaj paca reunuiĝo de la lando.”

La deklaro ankaŭ montris: “Se la kuranta Ĝenerala Asembleo estus kunveno por tio, ĝi estus do grava ŝanco por la Unuiĝintaj Nacioj plenumi la historian respondecon de ĝi alprenitan antaŭ la korea popolo kaj restarigi ĝian aŭtoritaton.

“Sed, kune kun kelkaj reakciaj fortoj la usona imperiismo, kiu ĉiam malhelpas la popolon en bataloj por naciliberigo, sendependeco kaj socia progreso kaj ĉiuj iliaj laŭleĝaj aspiroj, perforte pasigis la kontraŭleĝan rezolucion pri prokrasto de la diskutado de la korea problemo je unu jaro refoje por ne meti tiun novan temon en la tagordon de la Ĝenerala Asembleo de UN, ignorante la justajn postulojn de la korea popolo kaj la tutmonda pacama popolo kaj la principojn kaj regulojn de la Ĉarto de UN.”

La deklaro diris: “La usonaj imperiistoj povis prokrasti la diskutadon de la korea problemo en UN je unu jaro per netaŭga metodo, sed ĝi neniom povos malfortigi la simpatian kaj subtenon de la popoloj de la tuta mondo al la justa kaj urĝa afero de la korea popolo por reunuigi la splititan patrolandon, deteni la tendencon, ke la progresemaĵoj landoj de la tuta mondo aktive kunlaboras en la reunuigo de Koreio.”

### **REVOLUCIA ARTO SERVAS AL LA KONTRAŬUSONA NACISAVA MILITO**

Kun ĝisosta malamo kontraŭ la usona imperiismo, multaj literaturaj kaj artaj laborantoj de suda Vjetnamio, venkin-


te multajn malfacilojn, faris artajn prezentadojn en diversaj formoj por kuraĝigi sian armeon kaj popolon kaj per tio kontribuis al la kontraŭusona naci-sava milito.

Ekde aprilo, 1972, membroj de 15 armitaj propagandaj taĉmentoj en Binh Dinh-provinco iris al la fronto kaj la nove liberigitaj regionoj. Per programeroj kun revolucia enhavo ili propagandis al soldatoj kaj popolanoj politikojn de la Naciliberiga Fronto kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio por kuraĝigi ilin brave batali kontraŭ la malamiko. Iu ensemblo de Tra Vinh-provinco mem verkis kaj prezentis programerojn spegulantajn heroaĵojn de la lokaj trupo kaj popolo por servi al la naci-sava kontraŭusona milito.

### **RAPIDA DISVOLVIĜO DE LA ELEKTRA KAJ ELEKTRONA INDUSTRIO EN RUMANIO**

En la kuranta jaro la elektra kaj elektrona industrio de Rumanio rapide disvolviĝas. Ĝia produkta plano de la unua duonjaro estas jam superplenumita. La totala produkta valoro de elektraj mezuriloj, kontrolaj instrumentoj, aŭtomataj kaj komputaj ekipaĵoj pliiĝis je 15.3 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro.

Antaŭ la liberiĝo Rumanio ne povis produkti eĉ ordinarajn radiajn vakuo-tubojn, sed nun ĝi jam kapablas mem projekti kaj fabriki elektronajn komputilojn, elektronajn maŝinpartojn, instrumentojn kaj vakuajn teknikajn produktaĵojn uzatajn por kontroli produktan procedon, kaj elektrajn kaj tele-komunikajn ekipaĵojn por transportado, kaj hidroturbinojn, vaporturbinojn, kaldronegojn kaj generatorojn bezonatajn en konstruado de grandaj hidroelektraj kaj termoelektraj stacioj.



# Pompe Ekfloru la Amikeco

**K**IAM la pasaĝera ŝipo Fengceng, sur kiu vojaĝis la Ŝanhaja Knaba Piedpilka Teamo de Ĉinio, malrapide eniris en la havenon Jokohama je la vespero de la 8-a de aŭgusto ĉi-jare, ĝojo ekregis la kajon banatan en brilantaj lamplumoj. Svingante kolorajn flagojn kaj bukadojn, la longe atendintaj japanaj amikoj laŭte kriis: “Varman bonvenon al la ĉinaj amikoj!” Ankaŭ la urbestro de Jokohama Asukada Kazuo venis por bonvenigi la ĉinajn gastojn. Tiu varma bonvenigo prezentiĝis kiel uverturo de la amika vizito.

La veno de la nomita teamo al Japanio alportis apartan ĝojon al la piedpilka teamo Naraŝino de Ĉiba de Japanio, kiu vizitis Ĉinion en majo samjare. La maljuna trejnisto Niŝido Motomu

kaj tri membroj de Naraŝino speciale vojaĝis al Jokohama por renkonti la ĉinajn amikojn, kunportante lokajn produktaĵojn kiel donacon. La renkontiĝo de malnovaj amikoj estis tiel ĝojiga ke la gajaj knaboj de ambaŭ flankoj ridadis kaj saltadis ne reteneble.

Dum la vizitoj kaj maĉoj de la ĉina teamo en Jokohama, oni ĉiam povis vidi la maljunan japanan trejniston. Li konigis al la ĉinaj amikoj jen japanajn aferojn kiel gvidisto, jen sian kelkdekjaran sperton en piedpilka sporto kaj diskutis pri ĝia tekniko kun la ĉinaj sportistoj. Poste, kiam la ĉinaj amikoj informiĝis, ke por akompani ilin li ĉiutage venis frumatene al Jokohama kaj revenis nokte al sia hejmo en Ĉiba, ili fariĝis tre maltran-

*Kune kantas pri amikeco la knaba piedpilka teamo de japana Kanagava kaj la knaba piedpilka teamo de ĉina Ŝanhajo.*



kvilaj. Sed li diris: “Ĝuste tion mi devas fari! Ĉar tio konformas al la kora deziro de ĉiuj membroj de Naraŝino, kiuj min delegis tiucele!”

Iutage, Niŝido Motomu kaj tri sportistoj de Naraŝino venis al la ĉinaj amikoj antaŭ la tempo de ilia manĝado, kunportante manĝaĵon faritan laŭ japana gusto por ilin regali. La manĝaĵon sendis la gepatroj de 9 teamanoj de Naraŝino, kiuj nun jam estis okupitaj de siaj profesiaj laboroj kaj ne povis veni, sed ties gepatroj neniam forgesis la varman akceptadon ricevitan de siaj filoj en Ĉinio. La speciale preparita japana frandaĵo servis por esprimi ilian koron. Informiĝinte pri la deveno de la manĝaĵo, la ĉinaj sportistoj estis tre emociitaj. Tiu amikaĵo igis ilin memori pri la piedpilko, kiun ili ricevis de la malnovaj membroj de la Jokohama Knaba Piedpilka Teamo, kiuj vizitis Ŝanhajon en 1966. Tiuj junuloj nun jam ĉiuj havas sian profesion kaj ne povis veni renkonti la ĉinajn amikojn. Por esprimi sian korinklinon, ili aĉetis piedpilkon kiel donacon kaj ĉiuj subskribis propramane sur ĝi sian nomon. Tiuj donacaĵoj simbolis la profundan amikecon de la janapa popolo al la ĉina!

Post Jokohama, la Ŝanhaja Knaba Piedpilka Teamo vizitis la urbon Sendaj, kie la fama ĉina verkisto Lusin studis medicinon en siaj junaj jaroj. Ĉe iu verda montopiedo troviĝas monumento de Lusin, atestanta la amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj.

La 12-a de aŭgusto estis serena kaj suna tago. Akompanate de la urbestro de Sendaj s-ro Ŝimano Takeŝi, la teamo sub gvido de ĝia estro Ĝang Ĝenja veturis al la monumento troviĝanta sub ombro de densaj arboj. Apenaŭ haltiĝis la aŭtoj, kelkaj blankharaj japanaj maljunuloj venis antaŭ ilin kaj emocie diris, premante manojn al ĉinaj amikoj: “Bonvenon, bonvenon!” Inter ili iu malfacile paŝanta maljunulo diris ĝoje, montrante la monu-



*La sportistoj de la piedpilka teamo vizitas la laboristan loĝkvartalon de la haveno de Jokohama kaj ricevis bonvenigon de tieaj laboristoj kaj iliaj familianoj.*

menton: “Mi laboris siatempe kiel administranto por konstrui tiun monumenton. Mi ĝojas ke mi iom kontribuis al la amika interrilato inter la ĉina kaj japana popoloj!” La maljunulo jam aĝas 78 jarojn. Kiam li informiĝis, ke la Ŝanhaja Knaba Piedpilka Teamo vizitos la monumenton, li frue venis ĉi tien, malgraŭ sia malforteco, por bonvenigi la amikojn el la patrolando de s-ro Lusin. La ĉinaj amikoj estis profunde kortuŝitaj kaj kun dankemo manpremis kun li.

En tiu tempo alia vicleplena maljunulo kun blankaj haroj venis antaŭ ilin. Li nomiĝas Usuba Minoru kaj estis kunlernanto de Lusin en la medicina lernejo de Sendaj. Parolinte pri rememoroj pri

Lusin, tiu 85-jara kuracisto diris: “Mi estas fiera, ke mi havis kiel kunlernanton Ĝoŭ Ŝujen (Lusin), kiu estis granda filo de la ĉina popolo kaj ankaŭ bona amiko de la japana!” La ĉinaj gastoj certigis al li, ke ili nepre transdonos lian profundan amikecon al la ĉina popolo. Kaj informiĝinte, ke la maljuna kuracisto nun ankoraŭ akceptis ĉiutage pli ol 100 pacientojn, la ĉinaj gastoj tre ĝojis kaj deziris al li longan vivon. Antaŭ la disigo la ĉinaj gastoj fotiĝis tie kune kun la du maljunuloj kaj aliaj japanaj amikoj.

Iu 71-jara japana instruisto pasie amas belajn florojn, inter liaj kulturataj floroj iu originis el Nankino de Ĉinio kaj bone floras sub lia zorga kulturado. Li prezentis du paketojn da semo de tiu planto donace al la Ŝanhaja Knaba Piedpilka Teamo kaj la urbestro Ŝimano Takeŝi. La ĉina teamestro Ĝang Ĝenja diris: “Ni klopodos por ke pompe floru ĉie en Ŝanhajo kaj en Ĉinio la floro de amikeco!” Urbestro Ŝimono Takeŝi diris: “Ni prospere kreskigos tiun floron de amikeco en la parkoj de Sendaj!”

# Aparte Dolĉas

## Akvo de Amikeco

GIAN JU

**B**OTELO staras sur la tablo. En ĝi estas akvo de amikeco el Tanzanio, lando sur la bordo de la Hinda Oceano. La akvo memorigas al mi la tagojn dum kiuj mi laboris en la nomita lando.

En la 25-a de oktobro, 1969, komisiitaj de la Partio kaj la popolo mi kaj aliaj kamaradoj komencis nian marvojaĝon de Kantono al Tanzanio por konstrui akvoprovizajn sistemojn kune kun tieaj popolanoj.

Kiam mi staris sur la oceana pasaĝera ŝipo “Jaŭhua” kaj vidis iom post iom la malaperiĝon de la patrolando en malproksimeco, ondoj da pensoj ŝaŭmis en mi, same kiel tiuj elplugitaj de la pruo sur la Suda Ĉina Maro. Post longa vojaĝo, fine aperis antaŭ ni, ĉe la malproksima horizonto, la bela marbordo de Tanzanio.

Sur la insuloj Zanzibar kaj Pemba ebruiĝis la agrabla bonodoro de sennombraj pompe florantaj siringoj. En la haveno de Dar es Salaam svarmis diversaj ŝipoj, kaj sur la kajo, miloj kaj miloj da nigrahaŭtaj fratoj laŭte kriis en svahilia lingvo

svingante verdajn branĉojn en manoj: “Bonvenigon al la ĉinaj amikoj!” En varma jubilado manoj kun malsamaj haŭtkoloroj varme kunpremiĝis kaj okuloj akvece brilis en emocio. Per malsamaj lingvoj oni interŝanĝis vortojn pri la profunda amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Tanzanio kaj pri komune entreprenotaj laboroj.

Kelkajn tagojn poste nia grupo atingis Lindi kaj Ruvuma, kiuj troviĝas en montregiono de suda Tanzanio pli ol mil kilometrojn fore de la ĉefurbo.

Kiel postsigno de la longdaŭra agresado, pri-rabado kaj sklavigado fare de la koloniistoj estis videblaj malriĉeco kaj subevoluinteco de la lando. En la vasta montregiono troviĝis neniu akvokondukilo, kaj pro tio la loĝantoj sur altaj lokoj dum seka sezono ĉiam devis trinki malpuran akvon ĉerpitan el fundo de valo post marŝo de kelkaj km. En Kitle ni trovis, ke multaj kamparanoj suferis de bilharziozo pro trinkado de maltaŭga lagakvo. En Mbisa ni vidis, ke la lokaj tanzaniaj fratoj devas malfacile alporti akvon sur la kapo



de malproksime pro manko de mono por aĉeti akvon ĉe la hospitalo funkciigata de fremdlandaj koloniistoj kiu posedas akvoprovizan instalaĵon. La senkora ekspluatemo de la koloniistoj tre indignis nin; kaj la suferplena vivo de la fratoj nigruloj vekis ĉe ni profundan simpatian. Ĉio ĉi tio pli-fortigis nian volon nepre fari ĉion por havigi al tanzaniaj fratoj puran trinkakvon. Ni ofte starigis propramane tendojn en montvalo kaj sovaĝejo por tranokti kaj marŝis kune kun la fratoj nigruloj tra montoj kaj valoj por serĉi akvofontojn en alta temperaturo super 40°C. Dum konstruado ni kune portis materialojn sub malfacilaj kondiĉoj. En la kuna laborado ni kaj fratoj nigruloj helpis reciproke unu la alian kaj starigis inter ni profundan amikecon.


La tanzania laboristo Klemenc lernis de mi legadon de desegnaĵo tre serioze kaj diligente. Li ne ĉesis demandi kaj studi antaŭ ol li tute komprenis la lernaĵon. Kaj se li ion forgesis, li tuj ripetis la klopodadon. Tiel li rapide akiris la scion. Kiam ni konstruis akvoprovizejon en

Nuntongpo, li provis labori memstare. Lia labor-kvalito estis tute konforma al la postuloj. Mi elkore gratulis lian sukceson post kontrolado en vespero. Aŭdinte mian laŭdadon, Klemenc diris emocie: "La sukceso estas ŝuldata al via helpemo, vi ja estas niaj veraj amikoj."

En la akvoproviza punkto de Kitle ni utiligis la oletubon de elĉerpita puto per enmeto de 12-metra tubo por elkonduki la subteran akvon. La laboro farata sur skafaldo alta pli ol dek metrojn estis kaj danĝera kaj malfacila. "Danĝere estas labori supre, lasu tion al mi!" diris iu tanzania laboristo nomata Alifa, kaj tuj li surgrimpis la skafaldon kune kun mi. Baldaŭ kiam la subtera akvo elŝprucis el la tubo, ni ambaŭ estis plene malsekigitaj. De tempo al tempo ni atentigis nin reciproke pri zorgo al sekureco. Post nia kuna penado la ekipaĵo estis fine instalita kaj akvo elfluis laŭ la tubo.

Kun paso de laborplenaj tagoj kaj noktoj estis finitaj unu post alia la akvoprovizaj konstruaĵoj,

*Ĉina teknikisto kaj tanzania laboristo kune studas pri teknika renovigo dum la konstruado de la tanzania parto de la fervojo inter Tanzanio kaj Zambio.*





*Ĉina teknikisto kuras veston por tanzania laboristo en ripoza horo.*

entute tri relative grandaj akvaj centraloj kaj 20 akvoprovizaj punktoj, kaj instalitaj pli ol 60,000 metroj da akvokondukaj tuboj, tra kiuj pura akvo estas senĉese kondukata al ĉiuj vilaĝoj kaj domoj. Kiam finiĝis la akvoproviza konstruaĵo en Lupenda de Lindi — la hejmloko de la dua vicprezidanto Kavava, tiu persone alvenis, la unua gustumis la akvon kaj faris varman paroladon en la speciale okazigita kunveno.

En la tago de inaŭguro de akvoprovizado en Kitle, oni tamburis, dancis kaj kantis, ĝoje gustumante la dolĉan akvon. Du fratoj nigruloj portis

al mi botelon da akvo el la kondukilo kaj diris: “Jen akvo de pura amikeco inter Ĉinio kaj Tanzanio, akceptu ĝin kiel memoraĵon pri la komuna penado de veraj fratoj!”

Transprenante la botelon kaj aŭskultante la elkorajn vortojn de la fratoj nigruloj, mi ne povis reteni larmojn de emocio, rememorante la tagojn pasigitajn inter tanzaniaj fratoj, fratoj veraj kvankam malsamkoloraj. Banata en la brilaj sunradioj kaj irigaciata per la klara akvo, la floro amikeca inter la popoloj de Ĉinio kaj Tanzanio ĉiam pli pompe prosperas.





# Al Legantoj

**E**N tiu ĉi momento kiam la nuna jaro estos tuj forfluginta kaj la nova jaro rapide proksimiĝos, ni sendas al ĉiuj niaj legantoj korajn salutojn kaj deziras al ili feliĉon kaj progreson.

Dum tiu ĉi jaro ni ricevis leterojn de niaj legantoj en dekoj da landoj. La plejmulto el ili opiniis, ke kompare kun la pasintaj numeroj *El Popola Ĉinio* estas jam plibonigita, ĝia enhavo fariĝis pli varia, la artikoloj pli interesaj kaj la kvalito de la koloraj bildoj bona. Multaj el niaj legantoj esprimis sian varman laŭdon al ĝi.

Leganto de Jugoslavio skribis: “Malmultaj estas esperantaj gazetoj aŭ revuoj tiel belaspektaj, la fotoj tre originalaj kaj okultrafaj. La enhavo de la revuo ĝenerale bonega, el kiu certe ĉiu leganto povas ĉerpi multajn informojn pri la laboro, sinfero kaj disciplinita efektivigo de ĉiuj taskoj, kiuj rezultigas la progreson kaj rimarkindan prosperon de la vera socialisma lando.”

Leganto de Francio skribis: “La lastaj numeroj de *El Popola Ĉinio* estas pli belaj ol la antaŭaj. Por mi la ĉefa plibonigo konsistas el la paĝoj (tekstoj kaj kolorbildoj) pri ĉina arto: opero, baledo, pentraĵo, brodaĵo, ktp. La aliaj paĝoj ankaŭ estas intereseĝaj, ili konatigas novan Ĉinion kaj raportas la veron pri ĝi (mi aŭskultis multajn malverojn antaŭ mi legis *El Popola Ĉinio*-n).”

Ni kore dankas tiujn legantojn pro ilia kuraĝigo. Fakte ni ne sufiĉe bone plenumis nian taskon, precipe ni ne bone komprenis la bezonon de niaj legantoj, ĝuste kiel unu el la legantoj de Britio diris interalie: “La gazeto nun vere donas pli da informo pri la vivo kaj atingiĝoj en via lando... Via artikolo pri jarfina distribuo de produktogrupo donis tian informon. Vi tiel bone konas la sistemon ke vi eble ne povas kompreni ke ni fremdlandanoj ne scias pri tiaj simplaj aferoj, ĉar ni havas tute alian politikan sistemon.” Tio montras, ke ni ne donis sufiĉan konsideron al tia demando kaj ni devas plibonigi nian laboron.

Aliaj legantoj proponis, ke en nia gazeto estu aperigitaj pli da artikoloj pri la historio, kulturo, eduko kaj literaturo de Ĉinio kaj ankaŭ belartaj verkoj kaj poemoj. Kelkaj el ili opiniis, ke la

artikoloj kelkfoje estis tro longaj kaj ke en la gazeto ofte troviĝis iuj esprimoj malfacile kompreneblaj.

Al ĉiuj legantoj kiuj aktive subtenis tiun ĉi gazeton ni ankoraŭfoje esprimas nian dankon. Viaj kuraĝigo kaj proponoj helpas nin en la daŭra plibonigo de nia laboro kaj ebligas pliperfektigon de nia redaktado. Ni estas pretaj doni zorgan konsideron al la diversaj proponoj kaj klopodos por ilin efektivigi. Samtempe ni esperas, ke niaj legantoj, same kiel antaŭe, faros korespondan kontakton kun ni de tempo al tempo, elmetos siajn opiniojn aŭ kritikojn pri la venontaj numeroj de nia gazeto kaj ankaŭ varbos por ĝi novajn abonantojn. Ni kredas, ke sub via entuziasma kunlaboro *El Popola Ĉinio* plue ludos utilan rolon en la plifortigo de la kompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

## Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon

de

## Radio Pekino

### Por Eŭropo

GMT	Vendredo k Sabato 20:00—20:30
Ondoj(m)	47 45 31 25

### Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40

### Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	25 19

## Sur la Kovrilo:

Speciala Vendstablo de Varoj  
por Mongoloj en Nadmu-foiro

## Sur la Dorskovrilo:

Ĝoja Festo

### KOREKTO

En n-ro 11, pĝ. 35, maldekstra kol., l. 34, anstataŭ "jaro 1952" oni legu "jaro 1925".



# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO--LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio


**N-ro 12 (173) 1972**

## Ĉefa Enhavo

Popolanoj de Pekino Ĝoje Celebris la Nacian Feston...	1
Nia Merkato en Prospero.....	6
Nadmu-foiro sur Stepo de la Interna Mongolio.....	10
Komerca Kooperativo de Ĝajgeda.....	14
La Legom-produkto de Nanta-brigado.....	16
Nokta Veturo sur Hianggiang-rivero.....	19
En Pasageira Trajno .....	21
Novaj "Vendistoj".....	25
Brile Radias Tradiciaj Metiartoj .....	27
Penlaboro Estas Gloro.....	30
Aktivado de Geknaboj ekster la Lernejo.....	32
Transportado de Lignoj sur Dadu-rivero.....	33
Tra la Socialisma Ĉinio.....	34
Pompe Ekfloru la Amikeco.....	38
Aparte Dolĉas Akvo de Amikeco.....	40

# Pejzaĝoj de Pekino

Bijunsi-templo





Pitoreska loko en la Somera Palaco






Tanghuayu en Gongšan-parko





Antikvaj cipresoj en la Pekina Kultura Palaco de Laboruloj







La Granda Muro sur la monto Badaling, proksime de Pekino

Tajhe-halo en la Imperiestra Palaco



Parto de la Cíela Altaro



